

# REGO



RUSIA ESPERANTO-GAZETO



komuna eldono de REU kaj REJM

Nº 4 (11) aŭgusto 2002



en la numero:

unuaj rezultoj de  
OkSEJT-42

rakontoj pri IvERo-3,  
RA-2, BEF, BET, REJo  
Kongresa Rezolucio de  
UK-87

aperis nova PIV kaj  
nova eldono de E-rusa  
vortaro de Bokarev

ĉi-jaraj premiitoj de la  
Belartaj Konkursoj

traduko de

“La naĝanto”  
de John Cheever

“Bulteno de REU” kaj  
“REJM-info”

“Libra revuo”,  
literaturaj paĝoj kaj  
multo alia

tiun ĉi plakaton pentris  
Jelena Staricina  
por la renkontiĝo RA-2  
en Novosibirsk (estas skribite  
“Ĉu vi ellernis Esperanton?”)

Moskvo, 2002

## ***GRAVAS NE KVANTO, SED KVALITO***



*IvERo-3 – veteranoj kaj infanoj*



*RA-2 – studentoj kaj lernejanoj*

## IvERo-3

Dum 06-14.07.2002 okazis tradicia, jam la tria, Ivanova E-Renkontiĝo (IvERo).

Unue necesas menci i la mastrojn, farintajn vere grandan laboron por la organizado de la renkontiĝo, unuavice tiuj estas Tatjana kaj Maja Loskutova-j, Andrej kaj Jelena Obrezkovo-j, Svetlana Brovceva, Irina Galicina, Ljubovj Malej. El la gastoj menciindas Jefim Zajdman, Leonid Borisov, Dmitrij Cibulevskij, Mikaelo Bronŝtejn, Valerija Cvetkova, Bronislav Ĉupin, Nina Djomuŝkina, Igor Galiĉskij, Valentin Seguru. Ne eblas ne menci, ke en la aranĝo partoprenis 14 infanoj, por kiuj estis preparita speciala programo kun E-kurso, multaj ludoj, konkursoj, preparado de diversaj prezentoj, naĝado en rivero ktp.

Multaj aranĝoj en la programo estis vere impresaj. Bronislav Ĉupin kaj Nina Djomuŝkina preparis du muzik-akompanatajn prelegojn pri la famaj komponistoj Ĉajkovskij kaj Mozarto. Jefim Zajdman prezentis interese gan prelegon pri E-pioniroj, loĝintaj en Jalta. Dmitrij Cibulevskij alportis kaj prezentis sian novan libron “Enciklopedio de historio de la E-movado en USSR”.

Jefim Zajdman kaj Leonid Borisov (reaperinta en rusia E-aranĝo post 11-jara paŭzo) prezentis programon kun la plej malnovaj kantoj, aperintaj en nia movado antaŭ 40 jaroj. El inter la vesperaj aranĝoj memorindas ankaŭ la koncertoj de Mikaelo Bronŝtejn kaj de Andrej Obrezkov, Tago de naskiĝintoj.

Aparte necesas rakonti pri Leonid Borisov. Tiu ĉi vere legenda kantisto, malgraŭ lia multjara foresto en niaj aranĝoj, flue parolas la lingvon, memoras ĉiujn malnovajn kantojn kaj vigle interesiĝas pri la novaj.


Kelkaj el la prezentitaj de li kaj Zajdman malnovaj kantoj estis vera surprizo eĉ por mi kaj Andrej Obrezkov, malgraŭ nia multjara interesiĝo pri E-kantoj. Dum noktaj babiladoj en la kafejo Borisov prezentis ankaŭ kelkajn ruslingvajn kantojn, popularajn en la 60-aj. Ĉu multaj el vi aŭdis, ekzemple, gajan kanton kiu enhavas la vortojn “Fima Zajdman – belij emigrant”?

Por la fino de la informo – iom da statistiko. La plej juna partoprenantino estis Anna Galiĉskaja (1 jaro 5 monatoj), la plej aĝa partoprenanto – Bronislav Ĉupin (68 jaroj 11 monatoj).

*Garik Kokolija (Moskvo)*


Dum la unua IvERo antaŭ du jaroj oni ŝercis, ĉu la unuaj literoj signifas ‘Ivanova veterana’. Ĉi-jara Ivanova Esperanta Renkontiĝo parte konfirmis tiun varianton de la nomo. Entute ĝin partoprenis 45 personoj, pli ol duono el ili havas E-movadan sperton de 10 ĝis pli ol 40 jaroj. Inter la plej delongaj veteranoj menciindas Jefim Zajdman, Mikaelo Bronŝtejn, Valerija Cvetkova, Leonid Borisov, Dmitrij Cibulevskij, kiu ĉestis la revivigon de Sovetia E-movado en la 50-60-aj jaroj kaj kreon de tiama SEJM.

La programo ne estis tro streĉa, sufiĉis tempo kaj por seriozaj aranĝoj (kursoj, prelegoj), kaj por la amuzaj (konkursoj, koncertoj, ludoj), kaj por simpla ripozo ĉe loka rivero, la vetero tion ege favoris. Tradicie abunda estis la infana programo. Ĉi-jare la triono de parto-



*Leonid Borisov*

prenantoj estis geknaboj 1-18-jaraĝaj kaj la gepatroj povis sentime konfidi ilin al la infan-programa mastrino Jelena Obrezkova. Dum la renkontiĝo okazis porinfana kurso de Esperanto kun ludoj kaj kantoj kaj en cetera tempo la geknaboj havis distron ludante, konkurstante kaj partoprenante komunajn vesperajn aranĝojn.



*naskiĝtago de Bronŝtejn*

prizoplena Tago de naskiĝintoj, kiam estis gratulataj Mikaelo Bronŝtejn kaj juna Gleb Artamonov, filo de Garik Kokolija. Jam la duan jaron du veraj entuziasmuloj de Esperanto B.Ĉupin el Ijevsko kaj N.Djomuŝkina el Sankt-Peterburgo ĝojigis la iveranojn per muzikaj prelegoj pri mondfamaj komponistoj.

Sed la plej valora estis la komunikado, precipe kun tiuj, kiuj havas riĉegan sperton de Esperanto-agado en ne la plej favoraj kondiĉoj, kiam oni persekutis aŭ simple malhelpis esperantistajn aktivulojn en Soveta Unio. La organizantoj (A.Obrezkov, T.Loskutova, S.Brovceva, I.Galicina, L.Malej) ne povas ne esprimi la kontentigon, ke jam ekzistas pli malpli konstanta partoprenantaro de IvERoj. Ni, do, esperas, ke ilia kvanto kreskos de jaro al jaro, kaj ĉi-foja renkontiĝo ne estos la lasta.

La detala raporto pri la pasinta IvERO kun fotoj kaj bildoj aperos komence de aŭtuno en la TTT-ejo <[www.ivanovo.ac.ru/alumni/obran](http://www.ivanovo.ac.ru/alumni/obran)>.

**Andrej Obrezkov (Ivanovo)**

Etos' amika kaj sincera  
min vokis al la long-vojaĝ'.

Denove en Ĉernci IvERO  
bruligis korojn kun kuraĝ'.

La sama klub' esperantista  
ĝin organizis dum somer',  
kaj same la agad' persista  
ĝin sukcesigis sen moder'.

Matene gimnastik' ĉiamas,  
kiun vizitas infanar'.

La komencantojn ege amas  
Obrezkov, certe kun gitar'.

Kaj turmentegas, kaj instruas  
dum kurso por la tradukant'  
TL kun granda PIV – ĝin uzas  
konstante ĉiu ĉeestant'.

Bufedestrino de mateno



*la infanoj kantas "La kukolon"*

klientojn de diversa aĝ'  
atendas. Jam ŝi verŝas teon,  
bieron vendas kun fromaĝ'.

Ŝi ne forgesas mastrumadi,  
kaj zorgi ĉiam pri manĝad'.  
Nur mankas tempo por vagadi  
kun iu laŭ la luna pad'.

Al ŝi helpadas Ljuba, Ira,  
eĉ iu ukraina vir'.

Ne plu do estas sento mira –  
kompot' bongustas kaj kefir'.

Infanoj ĉiam okupitas –  
pri ili zorgas la Patrin'.  
Ŝi pro laboro tiu ŝvitas,  
sed ĝin plenumas kun obstin'.

Kaj diras certe ni sen timo –  
sukcesis pro la aktivad'  
de Miŝa, Leonid, Jefimo  
vesperaranĝoj, teumad'.

Do, vivu ni, partoprenantoj,  
kaj anoj de la klubo el  
la urb', neniam sopiranta  
pri amikec', fidelo, bel'!

*Dmitrij Cibulevskij (Ĥarĵkiv, Ukrainio)*

*Klarigoj: TL – Tatjana Loskutova, bufedestrino – Svetlana Brovceva, Ljuba – Malej, Ira – Galicina, la Patrin' – Jelena Obrezkova, ukraina vir' – Cibulevskij, Miŝa – Bronŝtejn, Leonid – Borisov, Jefimo – Zajdman.*

Dum 7-10-a de novembro en Kazanj okazos vica TERo, la sesa. Kiel la temo de la aranĝo estas planata "Mia familio kaj aliaj animaloj". La aliĝ-kotizo estas 40, 50 kaj 60 rubloj por lernejanoj, studentoj kaj plenkreskuloj respektive. La informo pri transdono de la kotizo, programeroj kaj atingebleco de la loko troviĝas rete ĉe <<http://tero.by.ru/>>. Petu plian informon de la organiza teamo laŭ la adreso <[kolonok@narod.ru](mailto:kolonok@narod.ru)>.

## HuRA! RA-2 okazis!

Granda insulo en Obj-a maro, kie okazis la dua RA (Renkontiĝo de Amikoj), gastigeme akceptis 35 esperantistojn el 7 rusiaj urboj – Irkutsk, Krasnojarsk, Moskvo, Novokuzneck, Novosibirsk, Tjumenj, Tomsk. La novosibirskanoj salutis la gastojn per la slogano "KaRAj espeRAntistoj, bonvenon al RA-2!".

La renkontiĝo permesis ankaŭ allogi kelkajn malnovajn esperantistojn el nia urbo, kiuj ankoraŭ ne sciis pri nova E-movado en Novosibirsk. Ili alportis al RA freŝan venton. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ kelkaj komencantoj, la plej juna el ili estis la 6-jara Varvara, ĉarma knabineto, kiu bedaŭrinde ne parolas Esperante, sed ĉion komprenas dank' al sia avo Pjotr Petroviĉ Stepanov (nia



*tiel okazis la prelegoj kaj kursoj*

fotisto).

Pri la programo de RA-2 okupiĝis studentoj de Siberia Sendependa Instituto. Ĉiutage estis organizataj 3 diversnivelaĵ E-kursoj. Ĉiumatene Maŝa Baranova gvidis matenan gimnastikon kaj dancojn. Ĉiuvespere Elja Nizamieva instruis nin kanti popularajn E-kantojn. Ni multe ludis kaj konkursis. Dum du tagoj okazis la ludo “Lasta heroo”, en kiu partoprenis du 12-personaj teamoj “Fungoserĉantoj” kaj “Kuloj”. La partoprenantoj konkurencis en diversaj sportaj kaj intelektaj konkursoj. Venkis moskvano Volodja Sergeev.

Ankaŭ la gastoj kontribuis al la programo. Vladimir Minin el Tomsk prelegis pri la usona vivmaniero, Volodja Sergeev okupiĝis pri ludoj por infanoj kaj ne nur por ili. La plej amuzan kurson proponis al ni Andrej Grigorjev el Krasnojarsk – li gvidis kurson por gesorĉistoj. Abundis rido kaj regis bonhumoro inter la partoprenantoj.

Dum la lasta vespero okazis bunta koncerto. La infanoj el Novosibirsk prezentis jam montritan dum EoLA-14 “Cindrulino” kaj ankaŭ novan teatraĵeton “Alico en mirakla lando”. Kantis Elja kune kun Anĵela kaj Maŝa Belenko el Novosibirsk, Mansur Mamkin el Tjumenj. Nikolao Neĉajev el Irkutsk verkis kaj kantis sian kanton pri nia bazejo “Kana paradizo”.

Mendita bona vetero (ja ni iĝis junaj Hari Poter-oj dum la kurso por gesorĉistoj) kaj kara maro, fungoj kaj beroj en la arbaro donacis al ni plezuron. Sur la insulo regis vere amika etoso, verde kolorigita kvazaŭ E-stelo.

*amike al ĉiuj Katerina Arbekova (Novosibirsk)*



*la mastrinoj preparis belajn teatraĵojn*

## BALTIA ALTERNATIVO

Esperanto estas lingvo internacia – almenaŭ tian celon ĝi havis dekomence. La renkontiĝoj, kie oni havas alian komunan lingvon krom Esperanto, povas aspekti iom nenature (alvokoj pri “lingva disciplino” ks.); ne malofte oni preferas ĉie krom oficiala programo uzi la nacian lingvon – “por pli facila kompreno”; kaj komencantoj, observante iujn “aktivulojn”, eĉ ne havas stimulon por lerni Esperanton ĝis perfekta nivelo. Do, tre gravas okazigo de vere internaciaj renkontiĝoj. Universalaj Kongresoj estas bona afero, tamen unue, ne ĉiuj havas tiom da mono, kaj due, en milhoma amaso malfacilas “vidi la okulojn”, trovi eblecon por sincera interparolo. Ideala E-renkontiĝo, miaopinie, devas esti ne amasa (ĝis ĉ.100 personoj), internacia (ne estu alia komuna lingvo krom Esperanto), kaj laŭeble kun iu antaŭanoncita temo, interesa por ĉiuj partoprenantoj. Pli frue mi bonŝancis viziti nur unu tian renkontiĝon – Internacian Literaturan Forumon (Gdańsk, 1995). Ĵus okazis la alia.

La unua Balta Esperanto-Forumo pasis en Kaliningrad 14-18.07.2002. La loko estas facile kaj libere atingebla el pluraj eŭropaj landoj. Ĝuste pro tio ĝin elektis ges-roj Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, kies plurjara laboro donas al ni “La Ondon de Esperanto” – eble la plej bonan ĉiumonatan revuon, kaj multajn legindajn librojn. Dank’ al klo-

podoj de tiu senlaca paro ni espereble havos tradician E-aranĝon, alternativan al malfacile atingebla por ni BET, destinitan por ne tro junaj personoj, kiuj ne ŝatas tendumadon kaj bruan diboĉadon, sed preferas seriozan programon en bona Esperanto.

En BEF partoprenis 113 personoj el 12 landoj. Notindas, ke poloj pli multis ol ruslandanoj, ke venis homoj el Moskvo, Murmansk, Niĵnij Tagil kaj Tomsk, ankaŭ el ne-baltaj Ĉeĥio, Slovakio, Francio kaj Svislando. Salutleterojn al la Forumo sendis prezidanto de UEA Renato Corsetti kaj vickonsulo de Esperanta Civito Ljubomir Trifonĉovski.

Solena malfermo okazis en la Urbodomo, kun ĉeesto de pola konsulo Jaroslav Czubiński kaj lokaj oficialuloj. Raportoj pri la Forumo aperis en lokaj gazetoj kaj TV, kun emfazo de aparta situo de Kaliningrad kaj ebla graveco de Esperanto por eŭropa integriĝo.

Okazis prelegoj kaj seminarioj pri regiona kunlaboro en Nordio kaj en Balta regiono, pri ekologio de Balta maro; rakontoj pri historio de Prusio, pri la vivo kaj filozofio de Immanuel Kant. Tre interesa estis la duonhora kun litova parlamentano Stasys Kružinauskas. Grava estis la literatura parto: seminario pri kritiko, prelego pri Vladimir Varankin lige kun ties centjariĝo; prezentoj de la unua volumo de Dostojevskij en Esperanto (el planata kvinvoluma verkaro) kaj de la nova traduko de “Eŭgeno Onegin” (eldonota en 2003); memprezentoj de la kunlaborantoj de “La Ondo...” (inter ili – tiu enigma Alen Kris, kies apartan ekziston multaj ne kredis; plej multe kontribuinta al la foruma programo Wolfgang Kirschtein; kaj ankaŭ mi – kiel senkompata kritikisto kaj kiel la tradukinto de “Onegin”). Furoris la kviza vespero laŭ sistemo de FREŜO, organizita de Marian Zdankowski (konjektu, kiu gajnis la unuajn premiojn en ĉiuj konkursoj...). Eksterlandaj gastoj povis konatiĝi kun la rusa kulturo en la vespero de rusaj romanoj.

Ni vizitis la muzeon de Oceano (ankaŭ la faman esplorŝipon “Vitjazj” kaj militan submarŝipon), buse ekskursis tra la urbo, veturis al Svetlogorsk kaj tie ĝuis la maron.

La loĝkondiĉoj estis sufiĉe bonaj el nia vidpunkto (tamen ankaŭ eksterlandanoj ne plendis; la plej pretendemaj loĝis en luksa hotelo). Ĉiuj eroj okazis laŭ la programo (disdonita dum registrado) kaj – imagu! – komenciĝis ĝustatempe.

Oni povas bedaŭri nur, ke ĉio tiom rapide finiĝis. Mi ŝatus esperi, ke Balta E-Forumo evoluos simile al la Urala: ŝanĝos sian titolon komence al Semajno, poste al Dekado...

Do kiam vi en venontaj jaroj vidos anoncojn pri Balta Esperanto...o en Kaliningrad – vi jam scios, ke tiu aranĝo estas vizitinda.

Volapukio futbalas kontraŭ Esperantujo. Televida komentisto: “Kiom streĉa matĉo! Volapukio malgajnas kun la rezulto 0:9. Tamen la volapukistaj zelotoj ne malĝojas, ilia teamo ankoraŭ havas ŝancon, ja la ludo daŭras dume nur tri minutojn!” (*esperanto-anekdotoj*)

*Valentin Melnikov (Moskvo)*

## AGRABLAJ KAJ UTILAJ TAGOJ

Post longa paŭzo mi sukcesis partopreni en Baltiaj Esperanto-Tagoj. La multjar-tradicia aranĝo BET-38 okazis la 7-an – 14-an de julio en Rigo. Por la tendarejo estis disponigita teknika lernejo, oportune situanta en centro de la latvia ĉefurbo.

Kompare kun la antaŭaj BET-oj, kiuj estis speco de enlandaj amasrenkontiĝoj de sovetia esperantistaro, la aranĝo estis vere internacia. Estis reprezentitaj ne nur la memkompreneblaj Latvio, Litovio kaj Estonio, sed ankaŭ la tuta regiono ĉe kaj apud la Balta maro: Finnlando, Svedio, Danio, Norvegio, Germanio, Pollando (la plej multnombra anaro, sed grandparte krokodila, bedaŭrinde), Rusio (nur du personoj, kvankam aliĝis 7), kaj krome kelkaj konsiderinde pli foraj landoj (ekz., Svislando, Hispanio). Entute estis ĉ. 180 partoprenintoj el

dudeko da landoj.

En la solena malfermo la ĉeestintojn salutis la organizantoj kaj reprezentantoj de diversaj landoj. Krome la esperantistojn alparolis kelkaj oficialuloj, inter kiuj estis veterano de latvia socia vivo ĵurnalisto Mavrik Vulfson. Tiu persono estas interesa ne nur kiel poligloto (liaj salutvortoj alternis trilingve: latve, ruse, germane, kio rimarkeble embarasis la interpretinton) kaj iama sovetia deputito (liajn elokventajn parolojn eble memoras tiuj, kiuj en 1989 spektis televide la Kongreson de Popolaj Deputitoj de USSR), sed ankaŭ kiel parenco de Zamenhof! Laŭ la vortoj de M.Vulfson mem, la aŭtoro de Esperanto estis kuzo de lia patrino.

La programon de BET ties organizintoj klopodis fari iel simila al tiu de Universala Kongreso kaj en kelkaj aspektoj sukcesis pri tio, kvankam certe en pli modesta skalo. Efektive: oni eldonis ĉiutagan informilon, speciala tago estis dediĉita al longdistancaj ekskursoj, okazis kurseto de la latva lingvo, apartan programeton havis infanoj. Gravan parton de la programo konsistigis kunvenoj de movadaj aktivuloj kun viglaj ide-interŝanĝoj, Somera Universitato (12 diverstemaj prelegoj), E-kursoj trinivelaj. Certan intereson elvokis konkursoj kaj kvizoj, al kio ankaŭ mi kontribuis. Ne mankis enurbaj piedekskursoj, diversaj koncertoj, bildekspozicioj, vesperaj dancoj, adiaŭa bankedo k.a.

En la libroservo estis multaj interesaj E-aĵoj, kaj malnovaj kaj novaj. El la lastaj mi menciuj almenaŭ du: “80 rakontoj pri la eterna juna 800-jara Rigo” kun multaj historie interesaj faktoj kaj la belan, kolore ilustritan grandformatan turisman prospekton pri Kaunas. La libroservon administris Aristo Mediņš, li faris tion kompetente kaj abnegacie: konstante deĵorante ĉe la tablo kun libroj, li oferis partoprenon en aliaj aranĝoj.

Ĝenerale, konkorde kaj sindone laboris la tuta organiza teamo, sed mi dezirus menciuj tiujn, kies aktivado estis plej rimarkebla. Tre multe faris por sukcesigo de BET la atentema pri ĉio prezidantino de Latvia E-Asocio Alida Zigmunde, la entuziasma Jāzeps Šlars, la energia Margarita Želve, la senlaca Biruta Rozenfelde.

La sekva BET okazos en 2003 en Estonio. En la retpaĝaro <<http://www.esperanto.ee>> oni promesis aperiĝi informon pri ĝi.

*Viktor Aroloviĉ (Moskvo)*



*belaj sunaj tagoj apud Kievo*  
informriĉajn kaj distrajn, kaj ankaŭ tre buntajn.

## REJO

“Kiel mi pasigis la someron?” Tio ĉi estas klasika temo de ekzercaj verkoj, kaj precize pri ĉi tio mi intencas rakonti. Pli ĝuste, ne pri la tuta somero, sed pri unu semajno, la unua semajno de miaj studentaj ferioj.

Mi pasigis la semajnon en la ripozejo “Kosmos” en Puĥivka apud Kievo, kaj pasigis ne por ludo, sed kun utilo. Ja ĝuste ĉi tie okazis Renkontiĝo de Eŭropa Junularo RE-Jo-2002. La renkotigon vizitis geesperantistoj el Aŭstrio, Bosnio-Hercegovino, Nederlando, Rusio kaj Ukrainio (Kievo, Poltavo, Dnepropetrovsk, Lugansko, Krimeo). Inter la partoprenintoj estis kaj spertaj esperantistoj kaj malspertaj novuloj. Oni povas konsideri min kiel unu el la lastaj. Jes, ĝi estis mia unua esperantista renkontiĝo. Kaj tagon post tago Esperanto altiris min, tagon post tago ĝi iĝis pli kaj pli interesa por mi. Estis amuze por mi aŭdi lecionojn de nederlanda esperantisto Ton Verwoerd,

Ni ĉiuj plezure kantis famajn kantojn dum la progresiga kurso “Septima”, gvidata de ĝia aŭtoro poltavano Vladimir Soroka kaj liaj asistantoj. Kaj krom lernadoj ĉiu tago estis plenigita per la riĉa kultura programo; ni havis konkuradojn kaj balotadojn, koncertojn kaj foiron, tagmanĝon en ukraina nacia stilo kaj eĉ festadon de la nokto de Ivan Kupala, ankaŭ, certe, ĉiutagajn diskotekojn.

Kaj poste estis disiĝo kun ĉirkaŭprenoj kaj amika rondo kun la tradiciaj magiaj vortoj “Per Esperanto por mondpaco kaj amikeco. Ĝis revido! Ĝis revido!! Ĝis revido!!!”.

Estis ankaŭ la promesoj de la organizantoj Mikaelo Lineckij, Julija Dzjuba kaj Olga Ŝiganskaja, ke ili havos fortojn kaj energion por aranĝi REJon en 2003. Kaj ankaŭ mi inspiriĝis, mi flamiĝis kaj decidis, ke mi volas helpi al ili en la sekvanta jaro en ilia nobla impeto.

*Olga Tomazenko (Ukrainio)*

---

## OPINIO DE REJo-INICIATINTO

Mi jam de multaj jaroj zorgas pri serĉo kaj eduko de novaj aktivuloj, kiuj povus daŭrigi tion, kion mi faris (kaj dume faras) dum pli ol tri jardekoj. Dank’ al enorma aktiveco de V.Soroka, kiu okazigis unikan Internacian Junularan E-Karavanon en 2000, riveliĝis kelkaj gejunuloj.

Okazigo de REJo estis por ili la unua organiza sperto. Tiuj estas Olga Ŝiganskaja kaj Julia Dzjuba. Mi speciale ne miksiĝis en la aferojn, estante fakte nur kunordiganto-“ŝtopanto de la truoj”, kaj restis preskaŭ plene kontenta pri ilia agado.

De unu flanko negranda kvanto de alvenintoj estas nebona fakto (ĉefe de la financa vidpunkto), sed por ke la novorganizintoj ricevu la sperton tio estis normala.

Ni jam pensas pri okazigo de REJo-2003 kaj eble de ankoraŭ iu aranĝo. Mi tre ĝojas, ke mi sukcesis atingi la celon – la knabinoj estas infektitaj de “organiza febro”. Certe, mi (kiel organizanto) scias, ke ĉio povus esti pli bona, sed ni ja ĉiuj scias ke bono, same kiel malbono, ne scias limojn... Mi esperas, ke sukceso de REJo pozitive influos ankaŭ funkciadon de KEJS – Kieva Junulara E-Societo. Ni jam planas septembre efektiviĝi informan atakon (simile al la Karavano) tra la universitatoj kaj ekde oktobro, tuj post la Ago-tago, komenci la instruadon.



*Mikaelo Lineckij kaj la nova generacio*

*Mikaelo Lineckij (Ukrainio)*

---

# ESPERANTO, KULTURO, EMOCIOJ, KAJ ESTETIKO – KIOM KUNIGEBLAJ ILI ESTAS?

(*Lingvokulturologia studo; daŭrigo, vidu la komencon en REGo № 3(10)*)

## 3. En-E-aj manifestiĝoj de la premisoj, komunaj por ĉiuj vivaj multifunkciaj lingvoj

### 3.1. Uzado de elipsoj kaj pleonasmoj, ripetado kaj analogieco

Estas konate, ke biologie mallaboremo estas defenda ilo kontraŭ pereo de la specio. Tial parol-produktanto (ne gravas la lingvo!) estas interesita **ŝpari energion** (do, laŭeble, fizike redukti direndaĵojn). Tiel aperas **elipso** (ellaso de iu diskurs-parto, ĉar ĝi estas ‘memevidenta’). La mala fenomeno, kiam oni uzas informe superflujajn vortojn, estas konata kiel **pleonasmo** (ekzemple, ‘per siaj propraj okuloj’, kie principe sufiĉus ‘siaj’ aŭ ‘propraj’). Ambaŭ nomitaj fenomenoj povas esti uzataj kun emociaj/estetikaj celoj, ekzemple, por oratori, sed ne nur. Jen specimeno de elipsa ŝerco ankoraŭ el la Zamenhofa Fundamenta Krestomatio. ‘*Juna edzino naskis filinon. La edzo volis sciigi la patron de sia edzino pri tiu ĉi fakto, aldonante, ke la fakto havis lokon en la sepa horo matene kaj poste per letero li skribos pli detale. Li telegrafas: ‘Hodiaŭ matene sepa filino naskita. Poste pli.’*’ La humuran efektan elvokas ambigueco de la elipsaj formoj: ‘*matene sepa filino*’ povas signifi kaj ‘*matene je la sepa*’ kaj ‘*matene, la sepa filino*’; ‘*poste pli*’ trakteblas kiel ‘*pliaj filinoj*’ kaj ‘*pliaj informoj*’.

Por farti psikologie bone homo bezonas samtempe **stabilecon kaj ŝanĝecon**. Tial lingva **monotoneco/ripetado de iu(j) lingveroj(j)** povas elvoki kaj pozitivajn kaj negativajn emociojn. R.Rossetti (R.R.) en sia ‘Spegulo de E-aj stiloj’ atentigas amatorajn verkistojn pri plumpeco de jenaj diraĵoj: ‘*prefere ne tre severe*’ kaj ‘*ŝi terurigiĝis ĝis plena paniko*’ kun fuŝripetado de respektive ‘e’/‘i’ (ni rimarkigu, ke unuakaze 4-foje ripetiga, aldone, ‘r’). Ankaŭ silabokvanta egaleco (kiel en ‘*liaj elokventaj paroladoj eminente kontribuis al la venko*’ estas, laŭ R.R., evitenda. Aliflanke oni povas intence ripetumi por atingi estetikajn efektojn. En la ĵus citita verko kiel pozitivaj estas menciitaj la versoj ‘*vibras vok’ en vaga vento*’ kaj ‘*sur la brue bata brusto de la aer’*’ kun la ripetoj respektive de ‘v’/‘b’. Ni povus, cetere, klarigi la trafecon de la korna lingvouzo ankaŭ per ioma ‘onomatopeeco’<sup>1</sup> de ‘v’ kiel sono de l’vento kaj ‘b’ kiel sono de bato, eksplodo.

**Ripeto** estas grava ero en la literatura kaj retorika figuraro/troparo. Oni povas ripeti la sama(j)n aŭ samradika(j)n vorto(j)n komence de pluraj frazoj (**anaforo**<sup>2</sup>; ekz. ‘*Bona estis Ludoviko kun siaj kolegoj en gimnazio; bona en la familia rondo; bona inter la amikoj; bona ĉiam kaj ĉie*’), en ties diversaj lokoj (**konversio**; ekz. ‘*Li faris al mi tro da bono por paroli pri li malbone. Li faris tro da malbono por paroli pri li bone*’). Oni povas emfaze ripeti konjunkcion (oratora figuro ‘**konjunkcio**’; ekz. ‘*oni mortigis homon kaj mildan, kaj grandan, kaj noblan!*’). Ripeto kuŝas en la bazo de unu el la specoj de vortludoj (t.n. **ripetumo**: ‘*Otelo sidas en hotelo sur fotelo kun botelo!*’).

Grava trajto de lingvoj estas **analogieco**. Sed potencialaj analogiaĵoj iam kontraŭas al aliaj fenomenoj/faktoj de la sama lingvo. Konscia konfronto de tiaj formoj povas kaŭzi estetikajn efektojn. Ekzemple, en jena ŝerco el ‘**Kruko kaj Baniko el Bervalo**’: ‘*Du stratulinogoj renkontiĝas en la bervalo parko. – Dio mia, ĉu vi ricevis novan peltmantelon? – Ba, estas nur io, kion mi kunflikis. – Flantazie!*’ (estas priludataj la paroj: kunfiki – kunfliki kaj flantazie – fantazie, kie ‘kunfiki’ kaj ‘fantazie’ ĉeestas latente kaj la neekzistanta en Eo vorto ‘flantazie’ estas produktita analoge al ‘kunfliki’ per aldono de ‘l’).

<sup>1</sup> Imitado de sonoj.

<sup>2</sup> Traktante retorikon, ni uzos la difinojn (eĉ mankantajn en PIV) de I.Lapenna el ‘Retoriko’. Ĉiuj ekzemploj de la alineo, krom la lasta, estas prenitaj el la sama libro.

### 3.2. Uzado de metaforoj, metonimiaĵoj, perifrazoj kaj komparoj

Certan esprimecon donas al la lingvaĵo **metafora, metonimia kaj perifraza**<sup>1</sup> uzado de vort(kun)oj. Kiuj el ili ricevas la ‘civitanecon’ en IPL kaj kiuj ne – decidas la praktiko (antaŭ ĉio, ĉu ili estas adekvate kompreneblaj kaj adekvate sentigaj al la homoj, denaske parolantaj malsamajn naciajn lingvojn). Ni citu nur kelkajn ekzemplojn el ‘**Domfabriko**’ (fakte, frazeologia vortaro): ‘*droni en revoj*’ (=plene fordoni sin al revoj, revegi), ‘*eterna dormo*’ (=morto), ‘*etendi amikan manon*’ (=agi amike, helpi en malfacila situacio). Kompreneble, tiaspecaj esprimoj estas ne nur vortar-unuoj. Ili estas aktive uzataj en la E-literaturo. Ekzemple, R.R. skribis perifraze: ‘*en samideanaj rondoj*’ (=inter E-istoj), ‘*lasi fali la manojn*’ (=rezigni strebadon; ofte renkontebla en E-tekstoj esprimo), Luis Hernandez metaforis: ‘*dum bleke parolas kanonoj, vomante detruon kaj morton*’.

Ĉiu E-isto komprenos la esprimojn ‘*malfermi la buŝon*’ (=ekparoli; metonimio ‘instrumento-ago’), ‘*trinki la morton*’ (=trinki venenon; metonimio ‘kaŭzo-sekvo’) kaj ‘*esti sen cerbo*’ (=esti stulta; metonimio ‘fizika organo-spirita produkto’), ‘*la Centra Oficejo (de UEA) decidis*’ (=la stabanoj de la CO decidis; metonimio ‘loko-lokanoj’). Facile imageblas kunpuŝiĝo de la metonimia/metafora kaj laŭlitera vortosencoj, kio donas premison por emocia efekto (vd. sube).

Pro la objektiva neceso konstrui unuecan bildon de la mondo kaj pro la psike kondiĉita universala homa emo al asocioj, en la lingvoj aperas **komparoj**: ‘*[tio] ĝuis kortuŝan akcepton, kvazaŭ kruĉon de freŝa, pura akvo por soifanto*’.

La Akademio de Esperanto ekhavis lokon en la Tut-Tera Teksaĵo (TTT aŭ WWW). La adreso de la paĝoj estas < <a href="http://www.akademio-de-esperanto.org">www.akademio-de-esperanto.org</a> >. La laboron pretigi tiujn paĝojn faris Bertilo Wennergren. ( <i>akademia-diskuto</i> )
---

### 3.3. Uzado de sinonimoj/antonimoj/homonimoj/paronimoj, polisemiaĵoj, kromsencoj (konotacioj), antinomio de la integra kaj analiza sencoj de derivitaj/kunmetitaj vortoj

Kiel skribis S.Karcevskij ‘ĉiu lingvistika signo estas potenciala homonimo kaj sinonimo samtempe... ĝi samtempe apartenas al vico de figuraj, transponitaj signifaĵoj de la sama signifo kaj al vico de similaj signifaĵoj, esprimitaj per diversaj signoj’. ‘Ni konstante transponas, uzas figure la semantikan valoron de signo..., sed ni komencas rimarki tion nur tiam, kiam la diseco inter la ‘adekvata’ (ordinara, kutima) kaj hazarda valoro de la signo estas sufiĉe granda por nin impresi’.

Pro la kialoj, parte priskribitaj en studoj de A.Melnikov kaj la doktora disertaĵo de M.Hagler ‘**The Esperanto Language as a Literary Medium**’ [La lingvo Esperanto kiel literatura medio], **polisemio kaj homonimio, sinonimio kaj antonimio, paronimio kaj kromsencoj (konotacioj)** ekzistas ne nur en etnaj lingvoj, sed ankaŭ en la aposterioraj IPL-j. Tio povas uziĝi en vortludoj kaj por aliaj estetikaj celoj.

Jen nur kelkaj specimenoj (iom arbitre klasifikitaj) de **sinonim-tipoj** en Eo:

1. **Divido laŭ kategoriojn**: *plaĝo* (kulturita) – *strando* (natura, sovaĝa).

2. **Precizigo aŭ reliefigo de iu sencero**: *sekva* (baza vorto) – *sekvanta* – *sekvinta* – *sekvonta* (tempo-precizigo); *nuna* (ĝenerale ‘estanta, okazanta’) – *aktuala* (‘efektive ekzistanta en la nuntempo’; ‘interesanta pro la nuntempeco’) – *moderna* (‘apartenanta al la nuna epoko, kontraste kun la antikva, kun iu antaŭa’; ‘plej nova, plej freŝdata’; mankas en PIV, sed gravas ‘aksiologie valora’).

---

<sup>1</sup> Metaforo – kaŝita komparo (ekz.: Puŝkin estas la Suno de la rusa poezio). Metonimio – uzo de nomo, kiu apartenas al unu objektiva realaĵo rilate al alia objektiva realaĵo, kiu estas iel ligita kun la unua (vd. ekzemplojn ĉi-supre). Perifrazo – uzo de priskribo rilata al iu objektiva realaĵo anstataŭ vorto, kiu simple nomas tiun realaĵon (la verkinto de la artikolo = mi).

3. **'Loka koloro'**: *policisto/policano* (neŭtrala, germana, angla) – *ĝendarmo* (franca) – *milicisto/milicano* (sovetia, iama pola) – *konstablo* (angla).

4. **Hipo/hiper-rilatoj** (iu vorto povus signifi sub-aŭ super-tipon de iu alia): *kanguruo* 'komuna nomo por la saltantaj aŭstraliaj marsupiuloj kun tre longaj postaj kruroj' – *makropo kaj valabio* – subspecioj; *trajno* – *vagonaro* (la lasta povas signifi ne nur trajnon, sed ankaŭ aron da vagonoj sen lokomotivo).

5. **(Mal)moderna, (eks)uza**: *sentamo* – *amoro, lascivo; fiŝido* – *fraĵo*. Moderna formo de radiko povas diferenci de la antaŭa sekve de iu tendenco. Ekzemple, en *ĥino* (arkaika)/*ĉino* (nuntempa) la ŝanĝo reflektas la emon elimini 'ĥ' (ĉar ĉi-sono estas malfacila por pluraj etnanoj). Ke tio estas tendenco, sed ne hazardo, atestas oficialigo de la formoj '*kemio, kirurgo, mekaniko, monarko*' k.a. kun 'k' anstataŭ 'ĥ'.

6. **Komunleksikaj/fakaj (inkluzive la poeziajn)/(mal)altstilaj**: *maljuna* (ĝenerala) – *olda* (poezia); *kapdoloro* (ĝenerala) – *migreno* (medicina).

7. **Diferencaj laŭ sia deveno/pruntofonto**: *Odiseo* – *Uliso* (greka – latina).

8. **Aksiologiaj**: *mezkvalita* (neŭtrala) – *mediokra* (kun negativa pritakso); *taksi* (neŭtrala) – *apreci* (kompetente taksi la artan valoron de io, kutime pozitive).

9. **Kuntekstaj (okazaj) sinonimoj**, kiel '*pala*' kaj '*kripla*' en la ĉi-suba ekzemplo el I.Lapenna: '*ĉu en liaj manoj ĝi [=Eo] fariĝos potenca komunikilo kaj esprimilo, aŭ ĝi estos nur pala, sensanga, senkolora kaj kripla balbutilo*'.

10. **Tabuaj/eŭfemismaj – rektaj**: *morti* – *forpasi*; *ellasi akvon* (Zamenhofa esprimo) – *urini* (medicina) – *pisi* (parola).

11. **Plenaj sinonimoj**, kiuj dume uziĝas sen klara distingo (ekzemploj, same kiel tiuj en p.12 kaj la du unuaj el p.13 estas el la libro de John Wells 'Lingvistikaj aspektoj de Esperanto'): *gazono* – *razeno*; *apuso* – *cipselo*.

12. **Ĝentila – neŭtrala – maldelikata formoj**: '*bonvolu silenti*', '*silentu*' aŭ '*ĉu kun prezeno aŭ kondicionalo*'-formo (ekz.: *ĉu vi silentus?*).

13. **Forme malsam(et)aj, sed enhave la (preskaŭ)samaj**: *jaĥto* – *jakto*; *meringo* – *meringelo* (tiu paro estas menciita en Wells, sed en PIV kaj PIVS la dua vorto mankas); *preferindeco* (derivaĵo) – *avantaĝo* (radika vorto).

14. **'Naciece preferataj'**: ekzemple, rusofono pro ekzisto de simila vorto en la gepatra rusa, verŝajne, preferus diri '*partizano*' kaj francofono pro analogiaj kialoj '*gerilano aŭ makisano*', brito – '*insurgento*'.

Ĉiu lingvo enhavas ankaŭ **antonimojn** (eble, tio respegulas objektivan realon, esprimitan en la filozofia leĝo konata kiel 'unueco kaj interlukteco de maloj'). Metante vortojn kun la mala signifo senpere unu apud la alia (en retoriko oni nomas tion *opozicio*), ni elvokas efekton de karambolo, malharmonio, frapeco: '*rigida ambicio sur elastaj principoj transiras multajn barojn*'; '*jen kial eĉ ministro de eksteraj aferoj povas havi internajn zorgojn*'.

Ankaŭ **paronimio**<sup>1</sup> apartenas al lingvaj universalaĵoj. Laŭ observoj de la subskribinto, en Eo paronimio fariĝis la plej riĉa fonto de vortludoj.

**Polisemio**<sup>2</sup> kaj/aŭ **homonimio**<sup>3</sup>. Ekzakta distingo de la ĵus nomitaj fenomenoj ofte estas

---

<sup>1</sup> Paronimio – fenomeno, kiu konsistas en tio, ke en lingvo ekzistas vortoj, kies formoj estas tre proksimaj, sed la signifo – ne (oni nomas tiajn vortojn paronimoj; ekzemplo de vortludo bazita sur paronimio: ĉiu viro trairas la tri stadiojn – de penisulo tra pensulo al pensulo).

<sup>2</sup> Polisemio (plursignifeco) – fenomeno, kiu konsistas en tio, ke en lingvo ekzistas vortoj, kiuj havas pli ol unu signifon.

<sup>3</sup> Homonimio – fenomeno, kiu konsistas en tio, ke en lingvo ekzistas vortoj, kiuj havas la saman formon, sed malsaman signifon.

ekstreme malfacila. Ĉar emocia efiko de ilia apliko esence samas, ni analizu ilin kune. Pro tio, ke Eo estas viva homa multifunkcia (kun relativa prioritato de komunikado super ekkonado de l' mondo) lingvo, ĝi neeviteble obeas al la ĝeneralaj lingvo-leĝoj, unu el kiuj jam estis menciita ĉi-supre (cite de Karcevskij, vd. p.9). Jen kelkaj ilustraj ekzemploj: '*arta*' povas signifi kaj 'rilata al arto' kaj 'ne ekzistanta en naturo, farita de homo', '*talento*' – 'antikva monero' kaj '(kutime denaska) doteco, kapablego en iu sfero de homa agado'. Kompreneble, tio estas riĉa fonto por kreado. Ekzemple, R.Schwartz skribas: '*Tre ofte ili [preseraroj] estas por la leganto la sola distraĵo en seka teksto kaj samtempe ĝojiga atesto, ke ankaŭ la kompostisto estis... distrita!*' Laŭ PIV '*distri*', interalie, signifas: 1) **malhelpe** deturni la spiriton de ĝia okupiĝo; 2) deturni la spiriton de ĝiaj prizorgoj, **agrable** okupante, amuzante ĝin. La du signifoj kutime uziĝas dise, tial ne malhelpas unu al la alia. Sed ĉi-tekste ili estas intence renkontigitaj, kio kaŭzas humuran efekton.

Ankaŭ alia speco de **homonimoj** en Esperanto estas ofte uzata en vortludoj. Ekzemple: 1. '*Tage* (propra nomo kaj la nomo de la hela parto de l'diurno – A.M.) *Erlander estas la ĉefministro en Svedlando. Sed kiu estas nokte la ĉefministro?*' 2. '*Ne pagu pli por vojaĝoj ol necese; veturu rabate* (derivaĵo 'rab-at-e' estas homonimo al la radika 'rabat-e' – A.M.) *kaj ne rabite*'.

Granda **afluo de propraj nomoj** el diversaj lingvoj, **aglutina karaktero**<sup>1</sup> de Eo (kun manko de morfem-distingaj markiloj), potencie naskanta derivaĵojn-homonimojn kun senafiksaj vortoj, faras homonimion (eĉ se partan, kiam homonimoj diferencetas nur prozodie<sup>2</sup> tiel ke ili limas kun paronimoj) sufiĉe ofte uzata por emociaj celoj. La radikaj (nederivitaj kaj nekunmetitaj) komunaj nomoj kaj aliaj vortspecoj, klasifikeblaj kiel homonimoj, en Esperanto relative maloftas.

Almenaŭ unu el la senceroj de plursignifa vorto povas esti **metafora**. Intenca 'konfronto' de figura kaj origina sencoj ofte kaŭzas humuran efekton, kiel en la jenaj frazoj: '*Sed kio pleje frapis min dum tiu neforgesebla spektaklo, tio estis viro staranta apud mi* [kiu frapis la dorson de la rakontanto – A.M.]; '*Kaj tiel staras la demando. Kiam ĝi estos laca, ĝi sidiĝos*'.

Kontraŭdireco de sencoj en la sama vorto (ekz. pro individua percepto de EP, inkluzive la aksiologian<sup>3</sup>, aŭ pro malsameco de situacioj) estas bona materialo por **ironio**. Kiam Schwartz parolas pri konstruado de la Berlina muro, li abunde uzas la vorton '*konstrua*', kiu havas la rektan sencon ('starigi sur la tero masonaĵon aŭ ĉarpentaĵon') kaj figuran 'celanta al pozitivaj rezultoj' (ĉi-lasta mankas en PIV). La mur-konstruado sendube estas 'konstrua laboro', sed el la vidpunkto de la rezultoj de la problem-solvo ĝi ja estas 'malkonstrua'.

Interesa kazo estas polisemio/homonimio de **derivitaj** vortoj. '*Orientiĝi*' povas esti analizata kiel 'iĝi orienta (ankaŭ figure: kontraŭa al la okcidentmonda/kultura)' kaj 'iĝi orientita je...'. Samtekstigo de la malsamaj signifoj en priskribo de la kontraŭstalinista ribelo de Hungarujo en 1956 kaŭzas satiran efekton: '*en tia kaoso eĉ la orientaj popoloj ne plu povis orientiĝi. Kaj okcidentiĝi ili ne rajtas.*'

**Kromsencoj/konotacioj**. Tuj-sube ni parolos pri **konotacioj** devenantaj el la Biblio. Eblas aldoni multajn aliajn. Ekzemple, al *azeno* oni atribuas fiobstinecon, nekonvinkeblon kaj stultecon. Ekzistas ankaŭ specifaj konotacioj, karakterizaj sole kaj unike por la E-kulturo. Bona ekzemplo de tio estas la vorto '*verda*' (agnoscata kiel la koloro de la E-lingvo kaj movado), kiu akceptas la tutan gamon da kromsencoj: 'E-a, E-ista, E-movada,

<sup>1</sup> E-vortoj formiĝas per 'kunĝluado' de morfemoj (radikoj, prefiksoj, afiksoj kaj finaĵoj).

<sup>2</sup> Prozodio inkludas kvalitojn de sonado (loko de akcento, longeco de vokaloj, manko aŭ esto de paŭzo, tono ktp).

<sup>3</sup> T.e. valor-taksan (pozitiva/negativa senco).

(mal)bona, sankta, primitiva' ktp. (depende de la situacio kaj persono uzanta ĉi-vorton; plejparte tamen, la kromsenco estas pozitiva).

### 3.4. Uzado de frazeologiaĵoj

Malgraŭ tio, ke pluraj sciencistoj kontestas la rajton/kapablon de IPL havi **idiomaĵojn**<sup>1</sup>, ili en Eo ja estas. L.Mjasnikov en sia disertacio pri la E-frazeologio atentigas, ke en la E-kazo, diference de la etnaj lingvoj, idiomaĵojn konsistigas nur vortoj kun libera kombineblo (kun 2 esceptoj) kaj dominas proverbiaj kaj komundirajaj unuoj. Pri certa frazeologieco de Eo, ellaborata surbaze de metaforigo kaj konsidero de etnalingvaj modeloj, atestas ankaŭ ekzisto de ĉi-rilataj vortaroj, kiel '**Domfabriko**', '**Kiel diri**', '**Tiel diru**' k.s. Samloke menciindas ankaŭ diversaj **proverbaroj**, **komunuzaj diraĵoj**, **aforismoj**, '**flugilhavaj vortoj**' ktp.: '**Proverboj de Marko Zamenhof kaj de Lazaro Zamenhof; (13155 proverboj)**' k.a. Kiel ekzemplo de uzo de idiomaĵoj por humura efiko citeblas jena diraĵo el E-renkontiĝo: '*Li perdis la voĉon kaj serĉas ĝin.*', kie estis priludita frazeologia vortkuno 'perdi voĉon'.

*Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu)*

*(daŭrigota)*

---

---

## ALVOKO

Ĉi-aŭtune en Rusio okazos granda ŝtata aranĝo – popolnombado. Laŭ la artikolo en tag-jurnalo "Nezavisimaja gazeta" (22.07.2002) en la anonima enketilo, kun kiu la ŝtataj nombriroj vizitos ĉiujn hejmojn en la lando, povos foresti la tradicia demando pri la gepatra lingvo. Tamen restos la demando pri la etna aparteno.

Do, mi proponas, ke ĉiuj esperantistoj respondu al la demando pri etno: ESPERANTISTO. Se tamen reaperos la demando pri la gepatra lingvo, ni skribu ESPERANTO. Ĉi tiuj proponoj ne celas (aŭ ne nepre celas) iujn ideologiajn aferojn, kiel, ekzemple, aprobon de Esperanta Civito aŭ iujn similajn. Mi nur celas altiri la publikan atenton en la tuta lando al nia movado. Ja nun estas la unika ebleco senpage esti aŭdata kaj de la tuta grandega Rusio kaj de ĝia fortega elito. Estas eksterordinara ebleco aperi (senpage) en la oficiala ŝtata statistiko. Tio dependas de ni mem, de nia unueco, unuanimeco kaj aktiveco. Ni devas esti kiel eble plej multaj en la statistiko – ja kvanto transformiĝas al kvalito laŭ la dialektika leĝo. Altiru ni al tiu ĉi aktivado niajn familianojn, parencojn, amikojn kaj najbarojn. Konsideru tion kiel tre valoran utiligan reklamkampanjon.

*Valentin Seguru, politologo,  
prezidanto de la Kontrol-revizia Komisiono de REU*

Mi volonte aliĝas al la alvoko de Valentin Seguru. Estas tre bona ebleco montri, ke esperantistoj ekzistas. Tute ne nepras, ke oni agnosku ekziston de esperantista etno aŭ nacieco, tute ne nepras esti raŭmisto, civitisto aŭ sennaciisto por partopreni tiun kampanjon – temas NUR pri atentigo pri nia ekzisto per trafo de la vortoj ESPERANTO kaj ESPERANTISTO en la oficialan statistikon, kio nepre estas utila afero. Tiuj, kiuj tute kontraŭas la ideon pri la ekzisto de esperantista etneco, kaj zorge gardas sian etnan identecon (rusan, tataran, baŝkiran, ĉuvaŝan kaj alian) povas resti trankvila, ĉar: 1) la enketilo estas anonima; 2) esperantistoj dume tiom malplimultas kompare al la rusoj, tataroj, baŝkiroj ĉuvaŝoj ktp., ke nia respondo, favora al Esperanto, neniel damaĝos interesojn de niaj veraj etnoj.

*Nikolao Gudskov, estrarano de REU*

---

---

<sup>1</sup> Idiomaĵoj estas vortkunaj kliŝoj, kies signifo ne ĉiam dedukteblas el la signifo de iliaj apartaj eroj. Ekzemple, en la rusa "бить баклуши".

## LINGVA DISCIPLINO

### *Sovetiaj tradicioj*

*(fino, vidu la komencon en REGo № 3(10))*

Volgia stelo [poste iĝis “Jene”] februaro, 1992

**Bezوناتas kirurgo!?**, P.Fiŝo: “Bedaŭrinde mi devas ankaŭ rimarki, ke SER [Smolenska Esperanto-Renkontiĝo (Novjarfesta)] estis tre krokodila. Ĉi tio ne estas kulpo de organizantoj, ĉar ili faris multe, ke oni parolu Esperante, sed veinde la partoprenantoj ne subtenis ilin. Necesas diri, ke volgianoj preskaŭ ne uzis la lingvon kaj male Lev Perevertajlo multe zorgis pri Esperanta parolado, tamen senrezulte. Mi volas kun malĝojo rimarki, ke inter ni estas homoj kiuj dum 5-6 jaroj nomiĝas esperantistoj, sed tutegale eĉ ne provas paroli en E-o.”

*“5-6 jaroj” – interalie la frazo signifas, ke la menciitaj personoj “esperantistiĝis” 4-5 jarojn pli frue ol aperis ŜĈKĤLando.*

MG № 4(12), 1992

**OKSEJT-33 en Tolmaĉovo. Kio sekvos?**, G.Kokolija: “... pli da homoj ol pasintjare partoprenis malkrokodilan konkurson ...”

MG № 6(14), 1992

M.Bronŝtejn: “Jes, tendarojn organizas SEJM [temas pri SEJM-2, certe]. [...] Kaj tie homoj tre multe krokodilas, edukadon esperantistan apenaŭ ricevas, kiel mi rimarkis.”

*M.Bronŝtejn mencias OkSEJT-32, pasintan en 1991 en Kustorka (Nijnij-Novgoroda regiono).*

Jene № 1(9), 1993

**Kalejdoskope:** “ ... pasinta SER dum Novjarfesto en Smolensk [...] oni ne tuj povas rememori ĉu estis Esperanto-parolado aŭ ne dum la renkontiĝo. Tamen fakto estas, ke la aranĝo kunigis ĉirkaŭ 70 homojn, venintajn por esperantumi ...”

*Jen kiel: “venintaj por esperantumi” kaj “ĉu estis Esperanto-parolado aŭ ne dum la renkontiĝo”. De alia flanko, ĝuste la ĝejnuloj estis aktivegaj organizantoj de multaj grandaj kaj malgrandaj renkontiĝoj: Ok- kaj OrSEJT-oj, EoLA-j, ATS, IJK k.a. Vere stranga kaj interesa fenomeno.*

Jene № 5-6, 1993

**Unu paĝo el KAJERO**, M.Koĉetkova: “Nokte ni pridiskutis kelkajn problemojn de kluba agado, kio fakte naskis nenion novan [...]: en la klubo dominu Esperanto-parolado; komencantoj, dum lernas la lingvon, havu sian klubeton kaj nur poste trafu la klubon ...”

*Bedaŭrinde en negranda urbo estas tre malfacile realigi la ideojn (pro diversaj obstakloj), sed ĉie, kie ĝi realiĝis, la rezulto estis brila.*

MG № 5(19), 1993

**OKSEJT-34 – ĉu ŝtupo malsupren?**, G.Kokolija: “La kresko [temas pri la kvanto de la partoprenantoj] okazis ĉefe pro la pligrandiĝinta kvanto de komencantoj aŭ homoj, kiuj eĉ tute neniam lernis Esperanton. Kaj preskaŭ ĉiuj ili eĉ ne klopodis ellerni kaj diri almenaŭ kelkajn frazojn en Esperanto. Ŝajnas, ke kelkaj venis nur por uzi eblecon ripozi ne tre multekoste. Kaj jen – la tendaro jam ne estis vera SEJT, kiu ĉiam logis pli malpli posedantajn la lingvon esperantistojn (kaj ne nur junajn). Se ne konsideri programajn aranĝojn, la rusa lingvo sonis ne malpli ofte, ol Esperanto. Pri la lingva nivelo atestas ankaŭ la fakto, ke verŝajne unuafoje dum OkSEJT-a historio (almenaŭ dum lastaj dek jaroj) ne okazis KGS – ĝi estis anstataŭigita per konkurso por komencantoj. Plej ofende estis vidi kiel

interkomunikiĝis ruslingve tiuj, kiuj facile povis fari tion en Esperanto (verŝajne por ne diferenciĝi de la plimulto). Tiu ĉi procezo komenciĝis ne ĉi-jare, sed ĝuste en OkSEJT-34 ĝi atingis minacan amplekson. Jam ne eblas fermi okulojn pri ĝi. Se lasi ĉion evolui same kiel estis, jam ekde la sekva tendaro al ĝi perdos intereson ankoraŭ ioma parto de spertuloj kaj baldaŭ ni havos aranĝon, kies plejmulto da partoprenantoj nur onidire aŭdis pri Esperanto. Mi opinias, ke necesas iel kontraŭstari tiun ĉi tendencon. La SEJM-konferenco jam akceptis decidon zorgi en sekvaj tendaroj konservi kaj restarigi ĉiujn ĉefajn tradiciojn de SEJT-oj (lingvan disciplinon [...]). [...] mi estis elektita kiel la komitatano pri amasaj aranĝoj. Do, mi klopodos organizi sekvan tendaron almenaŭ en tiu nivelo, kiun mi memoras esti en la plej bonaj SEJT-oj, kiujn mi partoprenis (ekz. Jerevan-1984, Kujbiŝev-1986 kaj ankoraŭ kelkaj). Jen estas kelkaj ideoj por tio: [...] ne akcepti al la tendaro personojn, tute neniam lernintajn E-on; por tiuj kiuj ne povas komunikiĝi en E-o almenaŭ en minimuma nivelo aŭ volas iom praktiki la lingvon, organizi paroligan periodon (dum 2-3 tagoj antaŭ la tendaro kaj eble eĉ en alia loko); averti ĉiujn pri tio, ke pro la obstina krokodilado ili povas esti forpelitaj el la tendaro (tiaj okazoj jam estis antaŭ kelkaj jaroj) ...”

*Mi partoprenis la OkSEJT-on en Smolensk kaj povas atesti, ke ĝi estis la plej krokodiliza E-tendaro en la 90-aj jaroj kaj eĉ verŝajne en la tuta postmilita periodo. En ia senco mi estis ĉe malfacila flanko de “barikadoj” kaj sincere agnoskas, ke la frazo “interkomunikiĝis ruslingve tiuj, kiuj facile povis fari tion en Esperanto” rilatas ankaŭ al mi. La situacio en la tendaro (de lingvonivela flanko) estis tre malfacila kaj ŜĈĤĤLandanoj multe pridiskutis ĝin post la aranĝo. Jes, kvankam por multaj personoj tio povas esti novaĵo, sed tio estas vero. Do, ni multe pridiskutis la lingvan situacion en la tendaro kaj la konkludoj estis jenaj: en la krokodileco de la partoprenantaro kulpis multaj eroj de la tendaro, inter kiuj unu el la ĉefaj estis obstinaj kaj krudaj provoj de la tendara gvidantaro kontraŭstari krokodiladon per nuda forto. Kulmino de la batalo estis speciala kunveno dum kiu E-uroj provis saĝigi krokodilemajn maldeculetojn. Verdire la rezulto de la kunveno estis ne tre rimarkebla, kvankam ĝi ne estis vana. Do, trafis segilo najlon. G.Kokolija poste neniam provis perforte solvi la problemon (ne kredu al liaj severaj vortoj pri forpelo) kaj rezulto de la saĝa politiko estis bona – jam dum sekva OkSEJT (en Jelec) lingvodisciplino estis multe pli alta (verŝajne eĉ la plej alta en la 90-aj jaroj).*



Jene № 15-16, 1993

**Koktele:** “... OrSEJT fakte ne okazis. Ĉirkaŭ 15 gejunuloj hisintaj standardon de tenda kampadejo nomis la aranĝon simple ‘amika renkontiĝo’, ĉar nek lingve [...] la aranĝo similis al SEJT.”

*Mi memoras la tendaron (nome OrSEJT-30½). Ve, dum la tendaro apenaŭ sonis E-o, eĉ famaj siberiaj lingvaj tradicioj ne sukcesis superi venintan junularon. Samnumere de “Jene” estas ankaŭ anonco pri “Junulara Esperanta (kutime tro krokodilema) novjara festa amika renkontiĝo [...] en Smolensk”. Ne pli, ne malpli: “kutime tro krokodilema”. Estas strange, sed por mi la novjarfesta renkontiĝo ĉiam estis unu el la plej esperantozaj aranĝoj. Klariĝas tute simple: mi tradukis vere abundegan krokodiladon al E-o por rusneparolantoj*

(ekz. Nader Farahat). *Kredu, estimata leganto, tio estis tre malfacila kaj tre interesa lingvopraktiko.*

MG № 6(20), 1993

**Kiel oni instruas Esperanton en Rusio?** (metodologia esploro), A.Ananjin: “Aleksandr Melnikov (Rostov-Don) uzis interesan memkreitan metodon [...] Cetere, la finintoj ne malofte estis iom krokodilemaj.”

SEJMinfo № 2(4), 1994

**SEJM preparas la aranĝojn:** “OkSEJT-35: [...] pli severe estos kontrolata la lingva disciplino, ne estos akceptataj al la tendaro personoj, tute ne lernintaj la lingvon ktp.”

SEJMinfo № 3(5), 1994

**SEJM preparas la aranĝojn:** “OkSEJT-35: [...] Kaj memoru, ke la tendaron rajtas partopreni nur personoj, kiuj dum tiuj dek tagoj parolos nur Esperante. La Verda polico ĉi-jare estos severa.”

SEJMinfo № 4(6), 1994

**SEJM preparas la aranĝojn:** “OkSEJT-35: [...] Speciale strikte estos kontrolata ĉi-jare lingva disciplino en la tendaro. Denove okazos malkrokodila konkurso. La verda policestro estos Garik Kokolija.”

SEJMinfo № 5(7), 1994

**OkSEJT-35: ŝatataj kantoj fariĝis pli ŝatataj:** “...OkSEJT-35 estis pli altnivela, ol pasintjara – laŭ lingvodisciplino ...”

MG № 4-5(24-25), 1994

**OkSEJT-35**, V.Melnikov: “Al komencantoj ĝi verŝajne plaĉis; kelkaj veteranoj grumblis, rememorante pri Armenio en 1984, aŭ almenaŭ Kustorka en 1991. [...] Da aroga krokodilado kaj ĝenerala malordo estis iom malpli ol pasintjare, tamen pli ol dezirindus.”

Ek № 2, 1995

**Pasis EoLA-VII:** “La aranĝo fariĝis terure krokodiloza...”

*Inter alie dum EoLA estis premiita unu el la plej krokodilemaj tiamaj esperantistinoj Olga Kolcova (pli konata kiel Kuraĝa Formiko). Ĉu ne estas strange: krokodilo estas premiito de Lingva Festivalo. Demandu vin, ĉu la Arta nivelo de la festivalo iĝis krokodila aŭ mem krokodiloj penas iĝi esperantemaj, sed io malhelpas al ili?*

SEJMinfo № 2(10), 1995

**EoLA**, G.Arosjev: “La plej pinta temo de ĉi EoLA iĝis krokodilado. Tamen tio estas facile antaŭvidebla, ĉar en tiujn aranĝojn plejparte alvenas junuloj, kiuj estas ‘eternaj krokodiloj’ aŭ novicej; kaj lingva disciplino ne estas. [...] Certe la krokodilado ne bone servas al Esperanto, sed prononci tion eblas pli ĝentile.”

**Iom pli ol “Ajna Distro”** [“Ajna Distro” estas tradicia EoLA-konkursero], I.Gonĉarova: “4. E-LUDOJ instruaj/lingvaj/esperant(ist)igaj/movadaj [...] (estu ĵurio, NE estu krokodilado ktp).”

MG № 2(28), 1995

**Festivalo EoLA en Kazanj**, G.Kokolija: “... mi timas, ke pro pigreco kaj krokodileco de rusiaj geesperantistoj post kelka tempo niaj junularaj aranĝoj (ne nur EoLA), famaj per siaj etoso kaj lingvonivelo, degeneros kaj estos nur renkontiĝoj de amuziĝemaj personoj, kiuj nur teorie scias pri Esperanto.”

La Ondo de Esperanto [plue LOde] № 6(25), 1995

**Muŝoj**, V.Melnikov: “*Esperanto* estas nur pasvorto por rekonigi la *siajn*. Ĝenerale el tiuj uloj nur dekono povas iom paroli Esperanton, la ceteraj scias nur ‘Saluton!’ kaj ‘Ĝis!’”

Ruslanda Esperantisto № 2(56), 1996

**Lingvo arta**, G.Arosjev: “Multaj grumbas pro malalta lingvonivelo de EoLA-j. Ve, ili pravas. Kaj pro tio ke nia festivalo tamen apartenas al Esperanto ne malpli ol SEJT-oj, oni decidis enkonduki lingvan disciplinon ankaŭ en EoLA.”

*Ve, la decido ne realiĝis.*

SEJMinfo № 2(16), 1996

**Ankoraŭ iom pri la EoLA**, G.Kokolija: “6. Lingva nivelo de la festivalo estis signife pli bona ol la pasintjara. Realigis malnova ideo, ke nur partopreno de eksterlandanoj povas kontribui al pli vasta uzado de Esperanto en niaj aranĝoj. Ĉi-foje al lingva disciplino plej multe kontribuis germanoj, litovoj kaj poloj.”

*Jes, vere E-konversaciado nur tiam aktiviĝas, kiam aperas eblo uzi ĝin kiel internacian komunikilon. Ve, la ideo ne ofte havas grundon por kreski.*

SEJMinfo № 4(18), 1996

**Kiel okazas klubkunvenoj de MASI**, V.Sergeev: “Kaj dum tiuj du horoj ĉiuj parolas nur Esperante, eĉ novicoj penas ne krokodili. Ĉiuj respektas lingvan disciplinon.”

*Jen estas kopiinda sperto.*

SEJMinfo № 5(19), 1996

**OkSEJT-36: unuaj impresoj**, G.Kokolija: “Lingva disciplino fakte forestis, ĉar mem P.Fiŝo, kiu pri ĝi respondecis, pli ofte uzis la rusan lingvon kaj sian scion de E-o montris nur dum programaj aranĝoj.”

Ek № 6/7, 1996

**Rememoroj pri OkSEJT**, A.Kastra: “... en tendaro Esperanto ne estas ĉiutageca lingvo de interparolo.”

**Estu BoNo** [Blankaj Noktoj], I.Gonĉarova: “Vespere ĉe la lignofajro oni eĉ iom E-parolis.”

Ek № 6, 1996: Suplemento: “Fratoj slavoĵ”

**Ni konsideru dum la sekva JEC-tendaro**, M.Klimaŝina: “Dum ĉi aranĝo Esperanto aŭdiĝis malofte. [...] sufiĉos nur pli vasta uzado de Esperanto dum la ludo mem [...] pri tio multaj petis.”

*Ĉu ne strange sonas la voĉ’ en dezerto. Partoprenantoj eĉ petas paroli malkrokodile, sed la organizantoj tion ne aŭdas. Kompare kun “Fratoj slavoĵ” (laŭ mi, bonega ideo kaj nemalbone realiginta ĝin tendaro) Smolenska kaj Taganroga OkSEJT-oj estis esperantozaj.*

Ek № 8, 1996: Suplemento: StRIGo-2

**Teatrumanta StRIGo**, O.Dadajev: “... la seminarioj StRIGo ne estas pure esperanistaj. [...] Pro tio preskaŭ ĉiuj lekciroj-studoj okazis en la rusa lingvo.”

*Laŭ mi, tio estas kvintesenca de krokodilismo. JEC-MASI, organizantoj de StRIGo sukcesis facile eviti lingvan problemon en E(ĉu ankoraŭ E?)-aranĝoj. Kompare kun ili eĉ la organizantoj de Muzo-1975 (rig. “Aktuale” № 1(16), 1975) estas sanktaj homoj. Mi tre volus komenti StRIGojn (almenaŭ tiamajn), sed min haltigis nur unu frazo el la numero de “Ek”: “Priglasitje nas jeŝĉo!” petegas Karina Arŝinova el Kazanĵ, verŝajne por pli profunde “malfermi nin al la ekstera mondo”. ŜĈKĤLando ripozas.*

Samovaro, 1997

**Tom pri la kongreso:** "... junulara movado. La ĉefa problemo: kiel eviti foriron de la lingvo el junularaj aranĝoj – kie samnacionoj renkontiĝas kaj krokodilas..."

*La temo estas klara, sed mi volas atentigi, ke la menciitaj "junularaj aranĝoj" estas SEJT-oj kaj EoLA-j. Ve, aliaj samrangaj mankas.*

Samovaro № 18, 1997

**Aroma Jalto kaj EoLA:** "Dum la festivalo funkciis S.L.S. (Servo de Lingva Sekureco), egala al instituto de verda polico en SEJT-oj. Kun la organiza kotizo ĉiu partoprenanto pagis "kaŭcion" [...]. Dum la festivalo oni kolektis krokodilaĵojn de ĉiu partoprenanto, kaj de tio dependis suma "reĵtingo". Fine de la festivalo la mono estis redonita al plej malkrokodilemaj homoj [...]. Por krokodiloj ilia mono estis perdita, krom tio ili devis helpi al la organiza teamo zorgi pri tagordo."

*Kaj denove ĉio bone funkcias por aranĝo, en kiu partoprenis 34 (kun 'lokaj' geesperantistoj' eĉ 40) homoj. Sed por 100, por 150 ...*

SEJMinfo № 1(21), 1997

**OkSEJT-37,** G.Kokolija: "Certe iuj "veraj esperantistoj" povas grumbli ke ofta krokodilado tute ne koheras kun lingva disciplino en "vera tendaro"; sed ja tutegale eĉ tendarano, kiu tutan tempon parolis nur ruse, post la aranĝo sciis signife pli multe da E-vortoj ol antaŭ ĝi."

*Estimu la vortojn, ĉar ilin esprimis homo, kiu faris plej multe por Lingva Disciplino kaj por OkSEJT-oj ĝenerale.*

Abelo № 4

**OkSEJT-38:** "... rezulte de organizita demandado oni nomis plej esperantemajn homojn (egale malkrokodilemajn) de OkSEJT-38: 1 lokon okupis Valentin Melnikov (Moskvo), 2 – Georgij Kokolija (Moskvo), 3 disdividis Andreo Ananjin (Ivanovo) kaj Miĥail Povorin (Moskvo). Ankaŭ oni nomis tri egale malkrokodilemajn kaj aktivajn komencantojn: Julija Kaminskaja (Jelec), Jelena Katajeva (Tomsko) kaj Nirab (Nepalo)."

*Nomi plej malkrokodilemajn tendaranojn – jen estas bona metodo. Certe sole per ĝi ne eblas solvi lingvonivelan problemon, sed sen ĝi estos pli malfacile.*

SEJMinfo № 2(23), 1998

**Majumu Jalte!,** K.Demjanenko: "Dum 'Aroma Jalto' oni postulis obeon de lingva disciplino de ĉiuj gepartoprenantoj. Okazis malkrokodila konkurso [...] Ĉiuj gajnintoj ricevis monajn premiojn."

LOdE № 1(51), 1999

**Sukcesa StRIGo,** Bård Hekland: "StRIGo celas ĉefe komencantajn esperantistojn (tial ĝi parte okazas en la rusa) [...] Postaranĝe eksterlanda vizitanto emas iom filozofii: Kiel funkcias Esperanto en aranĝo kie preskaŭ ĉiuj havas saman nacian lingvon? Ĉu ĝi bezonatas por krei bonan etoson? Oni ja plejparte krokodilis, kaj tamen la etoso ŝajne venis. [...] Honeste, ĉu ne pli gravas distriĝi kaj spertiĝi inter amikoj, ol per kiu lingvo oni tion faras?"

*Jen estas rara (en nia gazetaro) kaj pro tio pli grava, opinio de nerusparolanta esperantisto.*

La homaro dividiĝas je du partoj: piedirantoj kaj aŭtoveturantoj. Pri la piedirantoj ĉio klaras. La aŭtoveturantoj dividiĝas je du partoj: uzantoj de asekur-rimenoj kaj neuzantoj. Pri la uzantoj ĉio klaras. Sed la neuzantoj dividiĝas je du partoj: suferintoj pro akcidento kaj nesuferintoj. Pri la nesuferintoj ĉio klaras. Sed la suferintoj dividiĝas je du partoj... (*esperanto-anekdotoj*)

Helianto № 6(45), 1999

**Aroma Jalto '99**, K.Demjanenko: “Tradicie grandan atenton dum la festivalo oni donis al la lingvoordo, kiun prizorgis Servo de Lingva Sekureco persone de Dmitrij Cibulevskij. Organizantoj de la festivalo daŭrigis realigi la principon pri la monperlaboro pro la malkrokodilado. Kiel estis promesita antaŭ la festivalo, 20% de sufiĉe granda organiza kotizo estis uzita por fondi monpremiojn al plej malkrokodilaj gesamideanoj. Rezulte oni havis eblecon duonigi la elspezojn por loĝado k partopreno.”

*Certe la ideo ne povis aperi en kapoj de SEJM(1)-anoj. Sed hodiaŭ verŝajne necesas kopii ĝin.*

LOdE № 8-9(58-59), 1999

**Amasa tendaro en Tiĥvin**, V.Melnikov: “Ĉion ĉi gvidis homoj tute ne parolantaj E-on, kiuj fakte dominis en la tendaro.”

SEJMinfo № 2(26), 1999

**OkSEJT-39!!! (kiel vidita de organizintoj)**, A.Ananjin: “La tendaro startis de la paroliga periodo: ĉiuj alvenintoj estis disdividitaj je ses teamoj, en kiuj okazis intensaj grupdinamikaj ekzercoj [...] kaj kvarnivela E-kursoj. [...] Tutan tempon funkciis Lingva Servo, kiun tradicie admirende gvidis Konstantin Demjanenko. Ĉi-foje li preskaŭ ne provis puni, nur premiis por la bona lingvemo.”

*Jen estas du tute malsamaj opinioj pri Tiĥvina OkSEJT. Kiu pli pravas? Laŭ mi pravas ambaŭ aŭtoroj, ĉar ĉiu vidis sian flankon de la (certe sukcesa) tendaro: A.Ananjin, kiel ĉiam, iomete pli beligis kaj V.Melnikov, jam kutime, pli nigrigis. La vero estas meze: por tiom grandega tendaro la lingva nivelo estis normala.*

LOdE № 5(67), 2000

**Distre en Niĥnij Novgorod**, V.Melnikov: “Okazis unuleciana elementa E-kurso, ĉio cetera estis ruslingva...”

REJMinfo № 3, 2000

**Letero al REJM de Anatolo Gonĉarov**: “Observante deflanke SEJM-2 mi vidis ties malsanojn, kiuj malhelpis la evoluon. Ili estas: [...] falo de lingva disciplino, sekve ĉe la novaj geesperantistoj, eĉ pli-malpli parolantaj E-te, ne fondiĝis E-lingva penso-kosmo (nova scienca nocio), kio negative respreguliĝis ĉe la kunvenaj kaj tendaraj (“biokampj”) etosoj...”

*Kiel diras popola saĝo, se korpo ne havas malsanojn, do la korpo estas morta. SEJM-2 havis malsanojn, jes, tamen ĉu SEJM(1) estis tute sana? Rigardu supren. Estimata (eĉ estimategata) A.Gonĉarov, bv montri al ni organizaĵon sen problemoj. Sed iusence vi estas prava. Samtempe mi povas diri, ke SEJM-2 sukcesis ne nur daŭrigi la tradiciojn de rusia E-movado, sed inventi ion novan (ekz. EoLA). Bedaŭrinde la lingva disciplino iom lamis, sed neniu povis proponi ion pli bonan. Ĉio inventita ekster SEJM-2 (en la 90-aj jaroj) estis, de lingvodisciplina vidpunkto, multe pli malbona.*

REGo № 1(1), 2000

**Posttendaraj impresoj kaj pensoj**, M.Lineckij: “KVARE, ĝi povas esti bona motivo por komenci lerni la lingvon en diversaj ukrainiaj urboj.”

*Temas pri organizado de io simila al OkSEJT en Ukrainio. Se la aŭtoro tiel starigas demandon, do verŝajne de lia vidpunkto la tendaro estis sufiĉe E-lingvoriĉa. Kaj ni povas kredi al M.Lineckij, ĉar li estas “homo, kiu ekde 1970 aktive partoprenis kaj organizis pli ol dekon da similaj aranĝoj.”*

**Kio venos?**, K.Demjanenko: “OkSEJT estas LINGVA ARANĜO, kie oni prizorgas obeon de lingvoordo fare de ĉiuj gepartoprenantoj. Dume al Rusio neofte venas eksterlandanoj.

Dume nur nemultaj el ni povas forveturi eksterlanden por praktiki tie Esperanton. Do OkSEJT estas loko, kie ‘samlingvanoj’ konscie kreas ‘Esperantan’ lingvan ĉirkaŭaĵon por lingve perfektigi. [Ĉefa ideo de OkSEJT estas prezentita brile, sed post kvar alineoj la aŭtoro diras:] Kion fari por esperantigi OkSEJT-on? Ja oni facile povas perdi homojn, kiuj venas al OkSEJT ekparoli Esperante.”

*Mi petas la leganton memorfiksi la vortojn de K.Demjanenko, ĉar ili estas tre gravaj por kompreni la lingvodisciplinan problemon aplike al niaj aranĝoj.*

Mi speciale stopis la citatkolekton per la jaro 2000, ĉar ĝi estas iusence limo, post kiu ni venis en novan jarcenton kaj eĉ jarmilon (estimataj ŝatantoj de certaj ciferoj, temas ne pri matematiko, sed pri psikologia limo). Traleginte supreprezentitan materialon, iuj personoj povas diri: “Aĉa P.Fiŝo kolektis el abunda stoko de mielaj informoj gutojn da gudro kaj provas kotigi per ĝi nin, homojn en blankaj vestoj kaj kun verdaj koroj; nian fabelan historion de Esperantujo (Soveti-Rusia distrikto) k.t.p.” Kaj en iu senco ili estos pravaj. Jes, ofte estis cititaj frazoj de malkontentaj kaj “vmelnikaj”<sup>1</sup> personoj. Tamen, eĉ se ni fermos la okulojn, ŝtopos la orelojn kaj ensablighos la kapojn – la problemo de krokodilado ne malaperos. Jen kiaj ideoj naskiĝis en mia kapo dum preparo de la materialo.

**Unue**, la fenomeno de krokodilado kaj lingva disciplino estas ne nova. D.Cibulevskij skribis: “Ankaŭ pluraj ‘krokodiloj’ estis kaj dum antaŭaj SEJT-oj kaj dum nunaj SEJT-oj. Evidente tiu ‘fenomeno’ estas neevitebla.” Interalie, li estas verŝajne sola E-uro, fama veterano de E-movado kaj SEJM(1), laŭte dirinta pri la fakto. Ĉiuj aliaj ŝatas plibeligi, mitigi nian historion. Kiel ni vidas en la supreprezentitaj materialoj, la problemo de krokodilado estas eterna. Mi nun ne havas faktajn pruvojn, sed certas, ke antaŭ la jaro 1974 ne ĉiuj esperantistoj parolis en E-o. E.Priva (E.Privat) en “Historio de Esperanto” eĉ nomas la patron-lanĉanton de krokodilaj tradicioj: certe tiu estas L. de Bofron (L. de Beaufront). (En tiu senco la fama k-do Berjoza estas firma Bofronisto.)

**Due**, mi ne volas serĉi kulpajn personojn. Celo de la esploro estas lanĉo de prilingvodisciplina diskuto, ja la problemo estas akra kaj nenio diras pri ĝia malakriĝo en estonto. Ne gravas kiu aranĝo estis pli krokodiloza, gravas kial tio okazis kaj kiel eviti ripeton de la okazintaĵoj. (Speciale por plej duraj kritikuloj mi povas agnoski, ke pri ĉio kulpas mi kaj miaj amikoj ŜĈKĤLandoj.)

**Trie**, do venu al la temo. Mi petis vin, estimata leganto, memorfiksi la vortojn de K.Demjanenko, ĉar mi opinias, ke dum niaj E-aranĝoj restos renkontiĝoj de samlingvanoj – krokodiloj abundos. Ĉu vi rimarkis, ke en la citaĵkolekto mankas mencioj pri La Granda Trajnvojaĝo de Moskvo al Seulo, por kelkaj tagoj restinta en OrSEJT (1994), kaj IJK (1995)? Kaj tio estas tute klara, ĉar la aranĝoj estis vere internaciaj kaj E-o rolis vere kiel Internacia Lingvo. Ve, nun ni povas pofingre kalkuli esperantistojn, ne posedantajn la rusan kaj partoprenintajn niajn aranĝojn. Mi opinias, ke radiko de la problemo estas en manko de INTERNACIA komunikado dum SEJT-oj kaj EoLA-j. Ja estas strange, kiam lingvo internacia servas por komunikado dum aranĝoj naciaj. Ni povas elpensi diversajn allogojn kaj punojn, sed dum niaj aranĝoj restos naciaj ilin regos sola nacio: krokodiloj.

**Kvare**, tamen ni povas (kaj devas) plimalgrandigi la influon de malinternacieco de niaj

De la 5-a ĝis la 7-a de julio 2002 en la porinfana lernejo CESE-Pilote de la urbo Lokossa (Benino) okazis la unua BEK (Benina Esperanto-Kongreso) kun la temo “Ĉu Esperanto havas ŝancon en Benino?”. Ĝin partoprenis 26 esperantistoj el Togolando, 2 – el Niĝerio kaj 61 – el Benino.

*(landa-agado)*

<sup>1</sup> Vidu “Maltaŭgajn pensojn” en REGo № 2(4), 2001 (rim. de la red.)

aranĝoj. Ĉi-supre ni vidis, ke nia movado elpensis multajn rimedojn firmigi lingvan disciplinon dum la aranĝoj.

Paroliga periodo (plue PP) – jen estas, verŝajne, la plej brila invento. Kolekti novicojn kaj plonĝigi ilin en E-etoson – aspektas klare kaj facile. Tamen, kiel ni vidis, realigi la ideon estas malfacile. Kaj des pli okulfrapa rezulto estis, kiam PP estas realigita.

Verda polico (plue VP) – kune kun PP kaj aliaj rimedoj, estas bona, bela kaj utila parto de ajna (eks)soveta aranĝo. Ĝi estas la plej ofte uzata dum E-tendaroj, sed ĝi ne ĉiam utilas. Tio okazis, ĉar VP plej efikas kun aliaj paroligiloj kaj plej ofte malefikas estante sola. Certe, gravas ankaŭ la personeco de Verda Policestro.

Malkrokodila konkurso (plie MK) – de la unua rigardo ĝi ne aspektas grava paroligilo por komencantoj, sed ĝi estas bonega paroliga ilo por nekomencantoj. Kaj krome, MK kreas bonan lingvan etoson.

Ekzamenoj de ĈALK – por komencantoj ĝi estas tre grava afero. Sed ne nur por komencantoj, ĉar B- kaj certe C-ekzamenoj multe gravas por jam parolantoj.

Somera universitato (plie SU) – ĉefa graveco de la tendarero estas en prezento de praktika apliko de E-o. Ve, en niaj tendaroj regis opinio, ke SU devas esti nepre lingva (eĉ esperantologia) universitato. Tamen, se ni rigardos al la programoj de Internacia Kongresa Universitato de UK-oj, ni povas rimarki, ke ĝi estas dediĉita al diversaj flankoj de homaj scioj inter kiuj estas ankaŭ la lingvaj. Mi opinias, ke ni devas organizi diversteman universitaton, kie oni povas prezenti ajnan sperton, sed nur en E-o. Certe, esperantologia parto devas esti, sed ĝi ne devas esti sola.

Do, mi invitas vin, estimataj legantoj, partopreni la diskuton. Mi esperas konatiĝi ne nur kun la sperto de uroj de SEJM-oj, sed ankaŭ kun tiu de novicoj.

**P.Fiŝo (Koroljov)**

*P.S: Laŭ la informo de RE № 3(69), 1997 “pro specifaj cirkonstancoj de sia uzado krokodilo/krokodilo akiris pejorativan sencon. Nomi iun esperantiston krokodilo efikas kiel speco de publika riproĉo aŭ insulto en la socikultura medio de Esperantujo.”*

*P.P.S: Ĉiuj prezentitaj periodaĵoj situas en Moskva Esperanto-Biblioteko.*

---

## **MAŜA KOĈETKOVA IĜIS DIPLOMITO DE GRUŜINSKIJ FESTIVALO!**

Nia fama kaj ŝatata kantistino Maŝa Koĉetkova (Ivanovo) iĝis unu el la diplomitoj de Gruŝin-Festivalo, la plej granda en la mondo festivalo de aŭtoraj kantoj (ĉi-foje en ĝi partoprenis 300 mil personoj).

Maŝa prezentigis en multaj koncertoj de la Festivalo, ankaŭ la ĉefaj. Ŝi kantis tie proprajn ruslingvajn kantojn, por propraj melodioj, kiuj iĝas ĉiam pli rekonataj kaj aprezataj en la barda movado.

Antaŭe verkinta kaj kantinta nur en Esperanto, laŭreato kaj organizinto de pluraj EoLA-j, Maŝa dum lastaj du jaroj multe vojaĝas al la festivaloj de aŭtora kanto, tre ofte – kiel invitata majstro. Ŝi iĝis laŭreato de festivaloj en Kirov, en Brest (Belorusio) kaj en kelkaj aliaj. Jam kelkfoje ŝi estis invitata por koncertaj turneoj.

En la retpaĝo de EoLA-13 <[www.andreo.mailru.com/index-eola.htm](http://www.andreo.mailru.com/index-eola.htm)> eblas aŭdi du E-kantojn de Maŝa. Ruslingvajn ŝiajn kantojn vi trovos en <[www.progressor.ru/dara](http://www.progressor.ru/dara)>.

Gratulegojn al Maŝa!

*(esperanto-rus-informoj)*

---

# Bulteno de REU

## DECIDO DE REU-ESTRARO

La Estraro de REU anoncas, ke la vica, 19-a Konferenco de REU okazos en Moskvo kadre de la 22-a Rusia Esperantista Kongreso 12-16.12.2002.

## TTT-ejo DE REU HAVAS NOVAN ADRESON

La retpaĝoj de REU troveblas laŭ la adreso <<http://www.reu.newmail.ru>>. Ili estas ankoraŭ ne finpretigitaj, sed jam aktualigitaj kaj vizitindaj. La taskon pri aktualigo kaj ampleksigo de la retpaĝoj transprenis Dmitrij Vronskij el Volgogrado, kiu sukcesis dum mallonga tempo fari signifan parton de la laboro.

## MEMBRARO DE UEA EN 2001

En 2001 por la membreco en UEA pagis 6428 individuaj kaj 14889 aligitaj membroj, sume 21317 esperantistoj el 122 landoj. La tendenco de la IM malkreski daŭras, kvankam tre modere en 2001. Tiujare ĝi estas, ĉiukaze, kontraŭita de la kresko de aligitaj membroj, tiel ke la saldo estas pozitiva. Je la 1-a de julio 2002 UEA havis 5365 individuajn membrojn. Je la sama dato de 2001 ili estis 6127. Por havi fidindan ideon pri la suma nombro de individuaj membroj en 2002, tamen, estas necese atendi la UK-on dum kiu multaj membroj aliĝas.

*(Gazetaraj komunikoj de UEA)*

## KONGRESA REZOLUCIO DE UK-87

La 87-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Fortaleza (Brazilo) de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2002 kun 1484 partoprenantoj el 58 landoj, kun la temo “Diverseco – ŝanco ne minaco”,

Konstatas, ke la daŭranta integriĝo tutmonda kondukis al pozitivaj rezultoj, ekzemple internaciaj instrumentoj pri homaj rajtoj, sed ankaŭ al malegalecoj kaj al la ĉiam pli rapida perdiĝo de malgrandaj lingvoj kaj kulturoj,

Gratulas UNESKO-n pro ties agado sur la kampo de lingva kaj kultura diverseco, ekzemple per la Tago de la Patrino Lingvo je la 21-a de februaro ĉiujare, kaj aparte bonvenigas, ke la Ĝenerala Konferenco alprenis je la 2-a de novembro 2001 Universalan Deklaracion pri Kultura Diverseco,

Konstatas, ke la principoj kaj celoj de UNESKO en tiu kampo kongruas kun la idealoj de la movado por Esperanto, kiu celas per neŭtrala komunikilo transponti la kulturojn, tiel kreante forumon por egaleca interŝanĝo de kulturaj valoroj,

Atentigas en tiu kunteksto pri la graveco de la lingva dimensio de kultura diverseco, kaj substrekas la pretecon de la Esperanto-movado kunlabori kun ĉiuj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri la kultura dimensio en internaciaj aferoj.

---

***El la parolado de prezidanto de UEA prof. Renato Corsetti dum la Solena Inaŭguro de UK-87 en Fortaleza (Brazilo):*** “...dum la lasta jaro UEA faris pli ol ĝi faris dum la antaŭaj kelkaj jaroj, kaj ni jam laboras pri projektoj, kiujn mi ŝatas citi. Mi citu nur ekzemplojn: la reta membreco, la ricevado de la revuo tra la reto (transsaltante la presejon, la papteron kaj la

poŝtiston), la ebleco ŝanĝi vian adreson en la inform-banko de UEA rekte el via hejmo, la klopodo, bonvolu aplaŭdi, ebligi rektan konsulton de via konto ĉe UEA en plena respekto de via sekureco kaj privateco. Temas pri projektoj ankoraŭ ne finrealigataj, kaj pri kiuj miaj kolegoj forte avertis min, ke mi ne menciu ilin, ke mi estu prudenta. Sed mi estas malprudenta.”

## NOVA RETA SERVO – ABONU.COM

La 26-an de julio, je la 115-jariĝo de Esperanto, estis malfermita por prova uzado Informa Kanalo <www.Abonu.com>, preparita de UEA. La provperiodo daŭros ĝis la 15-a de septembro, ĝis kiam estos elkaptataj diversaj mistajpoj kaj misfunkcioj kaj ankaŭ farataj kelkaj plibonigoj.

<Abonu.com> celas servi kiel gastigejo por informaj retlistoj, retaj gazetoj, gazetaraj komunikoj, novaĵoj de ttt-ejoj kaj similaj informaj publikaĵoj. (La plej unua servo de <Abonu.com> iĝis regula dissendado de la Kongresaj Kurieroj de la 87-a UK en Fortaleza, kiuj tiel ricevis pliajn dekojn da legantoj tutmonde).

Inter la ĉefaj avantaĝoj de <Abonu.com> atentindas ĝia plena E-lingveco – pluraj centoj de ĝiaj paĝoj kaj teknikaj mesaĝoj estas plene tradukitaj en Esperanton de la ruslingva originalo – tre sukcesa profesia reta servo kun pli ol unu miliono da abonantoj.

Ne malpli gravas subtenado de la plej oftaj kodigoj de retaj E-tekstoj: UTF-8, Latin-3, surgatoj kun iksoj kaj kontrolsignoj (^). Abonante ion ajn en <Abonu.com> oni mem elektas en kiu formato (HTML, teksto, formato por PDA, poŝtelefonoj kaj pejĝiloj) kaj kodigo oni deziras ricevi la leterojn de retlistoj, ne dependante de la teknikaj eblecoj de aliaj abonantoj de la sama retlisto. La venantaj leteroj aŭtomate konvertiĝos kaj atingos la abonanton en la preferata varianto.

Necesas atentigi, ke, malgraŭ ke temas pri retlistoj, <Abonu.com> ne estas E-versio de <Yahoogroups.com>. En <Abonu.com> oni ne povas krei diskutajn listojn, sed nur informajn, kiujn preparas unu aŭtoro aŭ unu redakcia teamo. I.a. tial <Abonu.com> nomiĝas Informa Kanalo.

Ni kredas, ke la Informa Kanalo:

- estos speciale utila por redaktoroj de neretaj E-gazetoj, kiuj deziras disponigi ilin al la reta abonantaro (momente temas nur pri senpagaj abonoj, sed estonte paralele aperos ebleco lanĉi pagatajn retlistojn, tiel solvante la problemon de profesiaj E-periodaĵoj, kiuj ne povas permesi al si senpagan retan aperigon);

- multe helpos ankaŭ al retaj E-gazetoj, aperantaj nur en retpaĝaroj – ĝi permesas al ili grave plimultiigi la legantaron;

- helpos por tiuj informiloj, kiuj jam estas dissendataj per la retpoŝto, kontaktigante ilin kun vere interesita publiko – sen la bezono spame disanonci sin al ĉiuj konataj retadreso de e-istoj;

- permesos por kreintoj de E-ttt-ejoj teni konstantan kontakton kun la vizitanto, informante tiun pri evoluoj kaj ŝanĝoj en la ttt-ejoj;

- subtenos la aŭtorojn de diverstemaj retaj kursoj, kiuj ŝatus prezenti ilin en la formo de regule dissendataj lecionoj;

- plifaciligos retan agadon por E-organizoj, dezirantaj informi la membrojn kaj la E-mondon pri siaj novaĵoj;

- donos la eblecon rapide krei verajn retajn gazetojn por tiuj, kiuj ŝatus regule dissendi informojn pri novaĵoj de propraj landoj, regionoj, pri iliaj kulturaj kaj sociaj eventoj;

- kaj tiel faros por la ĉiam pli multnombraj esperantistoj-retanoj la retan E-vivon pli interesita kaj informiĉa.

Kaj ĉar ĝis la 15-a de septembro la retejo estos en la etapo de publika provado, vi estas

petataj informi al la retadreso <andreo@abonu.com> pri ĉiuj malklaraj lokoj, pri ĉiuj eblaj eraroj kaj misoj. Al la sama adreso estas invitataj sinturni tiuj, kiuj deziras krei en <Abonu.com> proprajn retlistojn kaj bezonas por tio pliajn klarigojn kaj subtenon.

(Gazetaraj komunikoj de UEA)

## NOVAJ REU-ALIGĜOJ POR 2002

### ALIGINTAJ KOLEKTIVOJ

Samara E-klubo (10 membroj: Alekseeva Olga, Prilepskaja Marija, Leontjev Gennadij, Ŝadrin Valerij, Aljakina Ljudmila, Fejgin Igor, Alfjorova Jelena, Kuznecova Jelena, Lisienkova Valentina, Kaplun Jelizaveta)

Uljanovska E-klubo (+ 4 novaj membroj: Faraĥutdinova Tatjana, Fetjuĥin Sergej, Minkin Andrej, Ubasjkina Julija)

### INDIVIDUAJ MEMBROJ

Arbekova Katerina (Novosibirsk), Bespalov Vladimir (Soĉi), Garibjan Sergej (Soĉi), Kovalenko Tamara (Soĉi), Lunjova Jelena (Jelec), Muraŝev Aleksandr (Sankt-Peterburgo), Ribin Gleb (Voronej), Ŝevĉenko Jelena (Moskvo), Ŝumkina Anastasija (Uljanovsk), Timersin Ĥalil (Ufa), Titova Ljudmila (Sankt-Peterburgo), Udalova Irina (Taganrog)

### REU-kotizoj por la jaro 2002:

100 rub. (por eksterrusianoj – 15 eŭroj) – individua kotizo (inkluzivas la membrokarton, REGon kaj aliajn informojn, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

2500 rub. (por eksterrusianoj – 375 eŭroj) – dumviva kotizo (ĉio la sama dum la tuta vivo);

20 rub. – familia kotizo (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco);

100 rub. + 20 rub. por ĉiu membro – kolektiva kotizo (REGo kaj aliaj informoj de REU por la klubo, la membrokartoj kaj voĉdonrajtoj en REU-Konferenco por la klubanoj).

*La rublaj kotizoj sendendas al **G.Kokolija** (la adreso estas en la lasta kovrilpaĝo), la eŭra kotizo pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.*



## maltaŭgaj pensoj:

### POSTKURANTE DU LEPOROJN

Ni laboras por Esperanto sindone kaj fervore. Tamen ankaŭ ni devas ripozi. Kurioze ni decidis ferii samtempe, tial en la antaŭa numero de REGo ne aperis nia artikolo. Bone kompreneble la mankon, ni strebos estonte akurati.

Intertempe okazis multegaj eventoj en E-medio – kaj bonaj, kaj teruraj. Tamen la ĉefa aĵo estas ke jes, la skismo finfine tonbris. Ĝis la lasta momento ni ne tre kredis, ke io tia okazos, tamen jes: de nun ni havas du somerajn E-renkontiĝojn, kiuj pretendas esti tutlandaj (malgrandaj, ekz. la volgograda “Intermondo-Sezam” aŭ la pasintjara “Vojo al Hindio” estas emfazite regionaj). Ĝis nun ĉio estis klara: riĉaj seriozuloj iras al UK, riĉaj malseriozuloj

– al IJK, mezriĉaj seriozuloj – al BET, mezriĉaj malseriozuloj – al IJS, kaj ĉiuj ceteraj – al OkSEJT. OkSEJT dum kvaronarcento estis la renkontiĝo, kiun oni efektive atendis nur pro ĝia atmosfero (vojaĝojn al eksterlandaj E-kongresoj oni ankaŭ atendas, sed ĉefe pro ekscita vizito al alia lando), kaj nur tre malmultaj homoj NE deziris veturi al OkSEJT. Iuj ne povis pro financa stato, iuj – pro manko de feritempo, tamen preskaŭ ĉiuj strebis al OkSEJT. Ĝi estis vera festo de rusiaj (antaŭe – soveta) esperantistoj. Fojfoje ĝi ne estis sukcesa, fojfoje – sukcesega, sed ĝi *estis*. Kaj nun...

Verŝajne, vi jam komprenis, ke temas pri OkSEJT kaj RET. La nova generacio de aktivaj esperantistoj decidis, ke ili sufiĉe kompetentas por organizi ion propran, kaj “ne permesis” al pli spertaj homoj (kun)organizi OkSEJT-on. Aŭ estas inverse: pli spertaj esperantistoj ne deziris labori kun (relative) “freŝaj” aktivuloj. Aŭ estas iu tria, kvara, du mil dua kialo... Kialoj ne gravas.

Gravas tio, ke nia E-movado ricevis vican baton, kiu nomiĝas “senpripensito”. La estrarojn de REU kaj REJM ne vizitis simplega penso: dume nia movado ne pretas, ne tiom fortas, por havi du renkontiĝojn. Dume en Rusio ne sufiĉas esperantistoj por du malsamaj someraj tendaroj (pli ĝuste: esperantistoj sufiĉas, sed ne ĉiuj havas eblon veturi al E-renkontiĝoj). Dume ambaŭ organizaj komitatoj (de RET kaj de OkSEJT) ne tiom kompetentas ĉiutere ne por fari bonan aranĝon unu sen la alia. Certe, organizantoj de RET estas pli spertaj – ĉar fulgas E-ĉielon pli longan tempon, tamen organizantoj de OkSEJT havas malpli stereotipan pensmanieron, kaj se al ĝi (pensmaniero) doni taŭgan direkton, la rezulto povus esti tre bona.

Sed ĉiuj ĉi konsideroj, kaj multaj aliaj, ne konvinkis la koncernulojn, kaj la nuna situacio estas jena:

OkSEJT, portanta la konatan kaj bonreputacian nomon, estas principe apartigita kaj laŭ kalkulo de organizantoj por la tuta tempo venos<sup>1</sup> nur 30-40 pesonoj. En 1997, la plej kriza jaro por E-movado, OkSEJT-on partoprenis ĉ.60 personoj, kaj preskaŭ ĉiuj – plentempe. Kaj ĉi-jare estos duoble malpli da plentempaj partoprenantoj. Sed pensigas ne nur la ciferoj. En la dua informletero oni legas: “Ni havos grandiozajn oficialan, klerigan, muzikan <...> programojn...”. Leginte la tekston, vere eblas kredi: okazos io unika. Tamen komence de julio unu el la respondeculoj pri la programo estis ankoraŭ streĉe pripensanta la koncepton, kaj ne povis interkonsenti pri bazaj aferoj kun alia respondeculo (ni tion vidis mem!). Komentoj ĉi tion ni nek volas, nek povas.

RET estas pli bonstata. Tamen legante en la repaĝo de RET pri la programo, ni vidas, ke ĝi estas sufiĉe tradicia, eble eĉ – *tro* tradicia. Nemultas novaj ideoj, oni promesas la samajn programerojn (lignofajro, koncertoj...), kaj en la organiza komitato estas plejparte la samaj vizaĝoj (OkSEJT-a teamo plenas de novaj nomoj). RET-on partoprenos ĉirkaŭ 100 personoj, kio egalas al modesta OkSEJT (en 2001 estis 130, en 2000 – preskaŭ 180). Do, eblas diri ke faktoj ankaŭ pri RET ne impresas.

Resume: ĉiuj kontentigis siajn ambiciojn, ĉiuj estas ege krutaj<sup>2</sup>, sed damaĝita estas... de nove nia multsufera E-movado. Kaj ja ne estas la unua fojo, kiam okazas io tia. Quousque tandem abutere, Catilina, patientia nostra<sup>3</sup>?

*jam ne sciante kun kiaj emocioj,  
viaj Ludovikoj Lazaroj Zamenhofoj <zamenhofoj@mail.ru>*

---

<sup>1</sup> La artikolo estas verkata fine de julio, kiam OkSEJT ankoraŭ ne finiĝis, kaj neniu scias precizajn ciferojn.

<sup>2</sup> Ĉi-kaze “krutaj” signifas “gravegaj”

<sup>3</sup> Ĝis kiam, Katilino, vi provos nian paciencon? (lat.)

# REJM-info

*redaktas Vitalij Malenko*

*Ĉefa temo de tiu ĉi REJM-info – OkSEJT-42. Ĉiuj materialoj kaj artikoloj estas preparitaj de Vitalij Malenko. Komence – kelkaj emocioj vidpunkte de la REJM-a ĉefrespondeculo.*

## **OkSEJT-42: PREPARADO DAŬRAS**

Verŝajne kiam ĉi numero estos dissendita vi jam mem venos al OkSEJT kaj vidos, kiel solviĝis diversaj problemoj, kiuj malbonigas al mi la vivon dum kelkaj lastaj semajnoj. Nun mi povas diri jenon: kiam mi ekdeziris iĝi REJM-respondeculo pri OkSEJT-42, mi ne imagis, ke estos tiom da problemoj. Fakte ili ne estas novaj: bazejo, kie ŝanĝiĝas estroj kaj sekve kondiĉoj, homoj, kiuj komence pretas kunorganizi la tendaron kun vi kaj poste trovas aron da kialoj por ne fari tion. Ĉi-jare estis ankaŭ nova problemo: RET. Certe mi pensis, ke estos en iu senco konkurenco inter niaj aranĝoj, sed nun mi ne nur sentas tion, sed foje ricevas diversajn fruktojn de ĉi konkurenco. Sed tio ne gravas. Gravas, ke ĉi-foje ni vere havos interesan aranĝon. Unue – venos nekutime malmulte da homoj kaj plej multaj inter ili estos junuloj. La programo pasos en kondiĉoj de vere tenda tendaro (kvankam dezirantoj vivos en bazejo). Kaj ĉefe – en la programo estos REJM-lernejo (gvidos Gonĉarov kaj Blinov). Nu, pri diversaj aferoj, kiel bela naturo, neenua programo, eksterlandanoj mi ne skribu. Mi nur ŝatas fini tiel – se ankoraŭ ne estas malfrue – simple venu al nia OkSEJT.

*(Bedaŭrinde pro la nedependantaj de la redakcio problemoj tiu ĉi numero de REGo aperas iom malpli frue ol estis planite, kaj estos dissendita jam post la fino de OkSEJT. – G.K.)*

## **OkSEJT-42 FINIĜIS**

La 7-an de aŭgusto finiĝis OkSEJT-42. Al la aranĝo aliĝis 94 personoj (22 tendoj + litoj en la bazejo). Inter ili estis Vladimir Samodaj, Anatolo Gonĉarov, Aleksandr Blinov. Krome estis 2 eksterlandanoj + 2 personoj el Ukrainio. Duono de la aliĝintoj estis novuloj, sed dank' al E-kursoj de Alekseo Besĉastnov multaj el ili fine de la tendaro jam scipovis paroli. En la progamo, krom la E-kursoj okazis REJM-lernejo, temaj prelegoj kaj seminarioj, kursoj pri diversaj sanigaj ekzercaroj (jogo, “ci-gun”, masaĝoj k.a.), foto-ekspozicio, kaj, kompreneble, la vesperaj programeroj (Tago de Ivan Kupala, muzika grupo veninta el Niĵnij kun irlanda muziko, ekologia ludo) kaj longaj ĉelignofajraj kantadoj. Dum lastaj tagoj pasis REJM-konferenco, dum kiu estis elektita nova REJM-komitato. Estis elektitaj 9 ĉefaj labordirektoroj de REJM. Krome multaj novuloj pasis REJM-ekzamenon kaj iĝis novaj membroj de REJM. Pli detale ekscii pri la tendaro kaj pri la konferenco vi povos en la sekvonta numero de REGo.

## **REJM-konferenco**

**5-6-a de aŭgusto 2002**

Dum OkSEJT-42 pasis REJM-konferenco. La konferencon antaŭis REJM-lernejo, kie dum 4 tagoj junaj aktivuloj aŭskultis prelegojn de Anatolo Gonĉarov kaj Aleksandr Blinov, partoprenis la diskutojn pri ontologia REJM-agado. Dank' al tiu serioza prepara laboro la

konferenco pasis rapide kaj fruktodone.

Al la 5-a de aŭgusto estis registritaj 25 REJM-anoj, el kiuj 12 partoprenis la konferencon (plus 5 voĉoj estis transdonitaj speciale por la konferenco). La 6-an de aŭgusto al listo de REJM-anoj aliĝis grupo de homoj, kiuj sukcese trapasis REJM-ekzamenon kaj interesiĝas pri movadaj aferoj. Entute al la 6-a de aŭgusto la nombro de REJM-anoj iĝis 44 (plus 3 patronoj).

### **Decidoj de la konferenco:**

1. Estis akceptita kiel sukcesa la laboro de la pasinta REJM-komitato.
  2. Estis konfirmita antaŭa skemo de REJM-membreco: ajna persono 14-30-jaraĝa, kiu trapasis REJM-ekzamenon kaj pagis la kotizon povas iĝi membro de REJM; plus patrona membreco.
  3. Kiel nepra kondiĉo de REJM-membrigo estis akceptita REJM-ekzameno (plifaciligita) aŭ atesto de 3 REJM-membroj pri sufiĉa lingvoposedo de la kandidato.
  4. Estis akceptita la propono ellabori projekton pri kluba membreco en REJM (respondeculoj: Kapitonov, Ŝejnina).
  5. Estis akceptitaj naŭ ĉefaj agadkampoj de REJM kaj respondeculoj pri ili: Instruado (Blinov), Informado ekstera (Ivanov), Informado interna (Ivanov), Amasaj aranĝoj (Malenko), Arto (Ŝejnina), Financoj (Kapitonov), Novaj membroj (Maslova), Kluba laboro (provizore Malenko), ATS (Malenko).
  6. Estis elektita nova REJM-komitato: Ŝejnina (Ivanovo), Maslova (Uljanovsk), Kapitonov (Ĉeboksari), Ivanov (Sankt-Peterburg), kunordiganto – Malenko (Ĵukovskij).
  7. Estis akceptita la propono pri registriĝo de REJM (respondeculoj: Olga Grigorjevskaja, Viĥrov).
  8. Estis akceptita la propono pri kreo de komisio por organizado de IJK-2004 en Rusio (respondeculo – Viĥrov).
  9. Estis akceptita la propono pri kreado de nova SEJT-regularo (respondeculo – Viĥrov).
  10. Estis akceptita la propono por nova SEJT-regularo pri disdivido de eventuala profito de SEJT-oj: duono iras al REJM, pri alia duono decidis organizantoj de SEJT kun la loka organizo.
  11. Estis akceptita la propono pri ŝanĝo de statuto al pli facilkomprenebla regularo. La bezonata por registriĝo statuto kaj la regularo povas esti du diversaj dokumentoj. Laboro de REJM baziĝos sur la regularo.
  12. Estis akceptita la propono fari sekvantan OkSEJT-43 en formo de instrua tendaro.
- Krome estis pli detale prezentitaj agadkampoj: rezultigis grupoj de aktivuloj, kiuj laboros pri ili.

### **POST-OkSEJT-a HUMORO**

Pasis OkSEJT-42. Kelkaj diras, ke pasis sukcese, al kelkaj ĝi plaĉis malpli ol antaŭaj SEJT-oj. Diversajn impresojn pri ĝi vi trovas en la sekvonta numero de REJM-info. Sed organizantoj de la pasinta aranĝo restis ne tre kontentaj pri ĝia rezulto. Dum lastaj jaroj programo de OkSEJT-oj celis jam spertajn esperantisojn kun bona lingvonivelo. Sed ĉiujare venas pli kaj pli da komencantoj kaj pro tio lingva disciplino dum lastaj SEJT-oj tre lamis. Ĉi-foje duono de la aliĝintoj ankaŭ estis malbonparolantoj. Pro tio REJM decidis principe ŝanĝi koncepton de OkSEJT. Ni intencas fari ĝin ne tendaro por spertuloj (RET povas transpreni tiun taskon), sed tendaro por komencantoj. Samtempe REJM pretas kunorganizi junularan programon de RET kaj fiksi tempon kaj lokon de sekvonta OkSEJT tiel, ke paŭzo inter du tendaroj estu mapli ol 5 tagoj kaj distanco inter ili – malpli ol 300 kilometroj.

La ideon pri nova koncepto jam aprobis REJM-konferenco; pretas kunlabori Anatolo Gončarov, Aleksandr Blinov. Ni esperas, ke ankaŭ vi subtenos nian iniciaton:

### **Nova koncepto de OkSEJT**

Ne estante plene kontentaj pri la apero de novaj junaj esperantistoj, ni venis al la konkludo, ke la tendara tempo en OkSEJT estas ne sufiĉe uzata por E-instruado. En urboj la komencantoj venas al 20-24-horaj E-kursoj kun forgesigaj paŭzoj post ĉiu leciono. Dum la tendaro estas je la dispoŝo ĉirkaŭ 80 (10x8) horoj, el kiuj oni kutime instruas nur dum 14-28 horoj.

Tial ni proponas la sekvan, 43-an OkSEJT-on plene dediĉi al esperantigo de la venontaj nululoj kaj komencantoj. Bone parolantaj REJM-anoj estas petataj, se-venaj al OkSEJT, helpi al E-instruado kaj priservo de la porkomencanta programo. Aŭ oni povas partopreni RET-on kun aparta, ekz. porjunulara, programo, kiun pretas kunorganizi REJM. Konferencon de REJM, diverstemajn seminariojn kaj REJM-lernejojn eblas organizi tuj antaŭ OkSEJT aŭ ene de la jaro, aŭtune, vintre aŭ printempe.

La krokodilemaj gesamideanoj estas severe ne-allasataj al OkSEJT por ke plene regu E-paroliga etoso. Ni esperas, ke se-sciaj anticipe pri porkomencanta tendaro E-instruistoj diversurbaj, ret-instruantoj celos siajn post-komencantojn por la partopreno. Kaj ĉe favoro mem venos efektiviĝi specife paroligan tendaran programon. REJM anoncas jam nun kompili la specifan paroligan programon. REJM anoncas jam nun trovi dekelkajn E-instruistojn kaj spertajn samideanojn por la interesa eksperimento. Ekde septembro REJM organizas suprateman retan diskutliston <oksejt-43@yahoogroups.com>.

*en la nomo de REJM Malenko Vitalij  
en la nomo de SEJM-1 Gončarov Anatolo*

### **IJK EN RUSIO: por kaj kontraŭ**

*Iom pri revoj, kiujn ni povas facile plenumi*

En unu el lastaj numeroj de REGo mi legis artikolon de s-ro Aroloviĉ, kie temis pri perspektivoj de eventuala UK en Rusio. Kaj antaŭnelonge en kapoj de kelkaj junaj rusiaj esperantistoj ekŝvebis la ideo organizi IJK en Ĉeboksari, do mi ŝatus iom analizi ĝin.

Pri kio temas: estis ideo organizi IJK-2004 en la urbo Ĉeboksari. Kial ĝuste tie? Ĉar dum lastaj jaroj tiu urbo iĝis vere centro de rusia junulara movado. Se ne en Ĉeboksaro, do kie? En Moskvo aŭ en Piter, sed en Piter estis antaŭnelonge, krome kaj en Moksvo kaj en Piter ne estas fortaj junularaj esperantistaj organizaĵoj.

Komencu ni de la problemoj, kiuj nepre aperos. La unua problemo aperos pri organiza teamo (mi memorigas, ke propono pri IJK al TEJO devas enhavi informon pri organiza teamo, programon de la aranĝo kaj ĝian eventualan budĝeton). Bezonatas kapabla gvidanto, prefere juna. Tio povus estis Jevlampieva, Blinov aŭ Grigorjevskij, sed apenaŭ iu el ili ekŝatus pri tio serioze okupiĝi. Krom la gvidanto bezonatas teamo, kaj estas malfacile kolekti teamon en 2003 por realigi tiun gravan projekton en 2004 (ĉe homoj troviĝos problemoj pri laboro, familio, infano, malsano, studado ktp). Plus – mem Rusio. Nia lando postulas vizon, sekve aperos problemoj pri invitleteroj, plus – distanco (sufiĉe fore kompare kun okcidenta Eŭropo). Kaj niaj bazejoj: eĉ se la organizantoj interkonsentos kun taŭga bazejo, subskribos kontrakton – tio ankoraŭ ne signifos, ke oni ne rifuzos al ili antaŭ kelkaj semajnoj.

Sed ja estas avantaĝoj kaj ili multas! Ekzemple, jam delonge IJK ne estis en orienta Eŭropo. En 2003 ĝi estis planita por Litovio, sed nun la planoj estis ŝanĝitaj kaj IJK sekvajare okazos en Svedio. Kaj Ĉeboksari estas vaste konata en TEJO pro diversaj sukcesaj

aranĝoj kaj pro belaj knabinoj. Plus – en 2004 UK okazos en Ĉinio kaj post IJK eblos organizi Postkongreson en Moskvo (2-3 tagoj) kaj Karavanon al Ĉinio. Plus – en Ĉeboksari ekzistas jam bonfunkcia sistemo de preparado de la inviteletoj (eblas fari dum kelkaj tagoj). Krome: en Ĉeboksari esperantistoj ĝenerale havas tre bonajn rilatojn kun ŝtataj instancoj kaj eblas esperi je almenaŭ morala subteno de la Komitato pri junularaj aferoj aŭ eĉ de Prezidento de Ĉuvaŝa Respubliko. Se en Moskvo aranĝo, kien venos 100 eksterlandanoj, pasos senatente, en Ĉeboksari tio iĝos evento de preskaŭ respublika nivelo. Plus – eblos organizi vere interesan kaj riĉan programon.

Kaj por Rusia movado tio povus iĝi bona puŝo antaŭen. Ĉu ni ŝatus provi? Tion demandon ni certe pridiskutos dum OkSEJT-a REJM-konferenco, kaj mi ankaŭ atendos viajn komentojn.

---

*Bonan eblecon por konatiĝi kun Eŭropa kaj Tutmonda E-movado donas al ni la seminarioj de TEJO. Kaj ĉi-foje amikan saluton kaj informon pri nova seminario de TEJO sendas al ni Sonja Petroviĉ:*

Inter la 6-a kaj 13-a de oktobro en EJC Strasburgo okazos sekva TEJO-seminario – “Homaj rajtoj sub ĉiutaga priesploro”. Ĝin partoprenos 30 gejunuloj ĉefe de Eŭropo, sed ankaŭ de aliaj partoj de la mondo, kaj kune traktos diversajn aspektojn de la temo. Pliaj informoj kaj aliĝilo troveblas ĉe <[www.tejo.org/seminarioj/hr2002.jsp](http://www.tejo.org/seminarioj/hr2002.jsp)>, aŭ vi povas skribi al <[seminarioj@tejo.org](mailto:seminarioj@tejo.org)>. Kotizo de 43 eŭroj inkluzivas vojaĝ-, restad- kaj programkostojn – aliĝojn indas sendi antaŭ la 15-a de aŭgusto!

*Mi ŝatus aldoni kelkajn vortojn. TEJO organizas seminariojn kelkfoje dum jaro, sed okazas ofte tiel, ke al tiuj (“haljaviĝaj”) aranĝoj venas preskaŭ samaj homoj. Mi tre petas, ke ĉi homoj estu pli modestaj kaj donu al komencantoj realan eblecon konatiĝi kun TEJO pere de ĉi seminario. Dankon!*

## AKTUALA LISTO DE REJM-anoj

*Alopina Jelena (Kovrov), Beŝĉastnov Aleksej (Moskvo), Burmisova Jekaterina (Ĉeboksari), Butorina Jelena (Tjumenj), Ĉesnokova Ksenija (Moskvo), Dadaev Oleg (Moskvo), Deljcov Jevgenij (Irkutsk), Dolmatova Darja (Jelec), Fridman Alla (Belorusio), Gerasimov Aleksandr (Nijnij Novgorod), Grogorjevskaja Natalja (Ŝumerlja), Grigorjevskaja Olga (Ĉeboksari), Ivanov Vjaĉeslav (Sankt-Peterburg), Jolkin Vladimir (Moskvo), Jurina Tatjana, Ĵukolina Marija (Ivanovo), Ĵuravljoŝa Jevgenija (Ĉeboksari), Kadar Aleks (Francio), Kapitonov Danil (Ĉeboksari), Kirillova Anastasija (Ivanovo), Korĉagin Pavel (Ĉeboksari), Kostina Jelena (Nijnij Novgorod), Lisina Anna (Sankt-Peterburg), Malasajev Konstantin (Tomsk), Malenko Vitalij (Ĵukovskij), Maslova Jelena (Uljanovsk), Meljnikova Tatjana (Ĉeboksari), Panina Jelena (Jelec), Panov Denis (Nijnij Novgorod), Polonskaja Aleksandra (Ukrainio), Sadikov Marat (Tula regiono), Sakajeva Diana (Nijnij Novgorod), Saljkova Galina (Jelec), Saveļjeva Jekaterina (Moskva regiono), Sudakova Aleksandra (Dimitrovgrad), Ŝejnina Sonjo (Ivanovo), Ŝmarova Uljana (Kostroma), Terjoĥina Marija (Moskvo), Tolokoljnikov Stanislav (Ivanovo), Travina Uljana (Kostroma), Tureckij Sergej (Novoĉeboksarsk), Vasilejko Polina (Nijnij Novgorod), Viĥrov Konstantin (Ĉeboksari), Zjukina Marija (Ĉeboksari)*

**Patronoj de REJM:** *Blinov Aleksandr (Ĉeboksari), Hekland Bard (Norvegio), Kokolija Georgij (Moskvo).*

# Eksciu, ke...

## LETERVESPERO EN KOSTROMA

En Kostroma okazis Internacia letervespero, dediĉita al la 860-a datreveno de fondiĝo de la urbo. Por Kostroma E-Teamo ĝi estis la unua provo, laŭ ni – sukcesa. Ĉio komenciĝis de la invito, kiun dissendis KETO al e-istaro dum Semajno de Internacia Amikeco en 2002. Krom la peto sendi bildkartojn kun salutoj ni deziris ekscii, kion povus signifi la vorto ‘kostroma’ en diversaj lingvoj, pri kio homoj pensas, aŭskultante ĝin, kun kio ĝin asocias.

Unuajn leterojn ni atendis nelonge. Iuj alvenis rekte al nia poŝtkesto, kaj ĉiam estis por ni granda miro kaj surprizo: “Ho! Letero de foro! en Esperanto! Kia bildo! Kia poŝtmarko! Interese, kion oni skribas?”. Preskaŭ duono da mesaĝoj venis al ni per retroŝto.

Entute venis ĉ.70 sendaĵoj el Rusio (Moskvo, Elektrostalj, Siktivkar, Ĉeboksari, Nereĥta, Ĥabarovska regiono, Primorskij regiono), Bulgario, Hungario, Serba Respubliko, Slovakio, Italio, Francio, Belgio, Germanio, Svedio, Finnlando, Nederlando, Brazilo, Kolombio, Kanado, Usono, Dominika Respubliko kaj Nepalo. Inter ili estis ankaŭ kelkaj libroj, broŝuroj, turistvarbilo kaj e-poŝtkovertoj.

En siaj mesaĝoj la homoj certe nin gratulis okaze de la datreveno, deziris al ni sukcesan vesperon kaj daŭrigon. Kelkaj dankis nin, ke ili ekscii pri Kostroma unuafoje kaj interesiĝis scii devenon de la vorto ‘kostroma’. Venis bildkartoj de Don kaj Angela Harlow, Mila van der Horst-Kolinska (Nederlando, aŭtoro de ‘Mazi en Gondolando’). En granda letero el Primorskij regiono de Vladimir Sudakov ni legis gratulilojn, kies vortoj per la komencliteroj formis ‘kostroma’.

Ege interese estis legi la opiniojn pri la vorto ‘kostroma’. La alvenintajn variantojn oni povas dividi je tri grupoj. La unua estas simple ideoj, fantazioj. Ekzemple unu kanadano trovis en ‘kostroma’ konatan anglan vorton ‘coast’ kaj menciinte, ke li tute ne scias la signifon, supozis ĝin ‘mara bordo’! Pleja parto da e-istoj tiugrupaj trovis la vorton ‘roma’ kaj iel legis kun samnoma antikva urbo: ‘Roma kosto’. La dua parto de la mesaĝoj sciigis nin pri naciaj tralegoj. Stano Marček, la redaktoro de “Esperanto”, skribis pri slovaka signifo: ‘urba ĉirkaŭaĵo’ aŭ iuj oŝtoj. Anatolij Sidorov el Siktivkar mirigis nin per tio, ke laŭ praktikaj lingvoj, la vorto ‘kostroma’ post kelkaj variantoj sume diras pri ‘fora lando de riĉaj kaj sendependaj homoj’!

Sciivolemaj aŭtoroj de la tria parto trafoliumadis enciklopediojn, legis saĝajn, foje sciencajn librojn. Elstara retletero venis el Germanio, kie e-isto trovis en Germana Leksikono de la 19-a jc. artikolon pri Kostroma kaj tradukis ĝin en E-on. Ni povis legi pri la tiama Kostroma vidpunkte de iu germano kaj raportoj pri okazintaj ŝanĝoj al nia samtempulo. En Kanazo troviĝis Geografia registro, kiu diris pri granda riverhaveno en Kostroma, pri grava rolo de nia teksa industrio... Mirinde estas, kiel estas skribite en eksterlandaj libroj pri nia, nun modesta urbo en tiu senco! Multaj diris pri siaj bazaj konoj pri Kostroma, pri lina industrio,



kelkaj bildkartoj

unu francino eĉ pri arĝentaj juvelaĵoj (Krasnoje-sur-Volga). Ricevi leteron de Alla Fridman estis aparta plezuro, ŝi verkis ruslingvan versaĵon, kiu en ĉiu linio enhavis literkombinojn el la nomo de nia urbo.



*klarigas Uljana Ŝmarova*

originalo (kutime bildflanke), kserokopio de la reversa flanko kun originala teksto kaj traduko de la mesaĝo.

Jen kion rakontas pri la ekspozicio Jelena Serova, ŝi prezentis ĝin al spektantoj: “Opportuna stando, amikeca atmosfero de la biblioteko helpis montri tutan diversecon de la ekspozicio. Specifan intereson ekscitis eldiroj pri deveno de la nomo Kostroma. Mi emociiĝis dum la montrado. Kaj tio estas natura, ĉar mi deziris ke alsenditaj informoj ekinteresu spektantojn kaj penetru iliajn animojn, samkiel la niajn.”

Dum junio ĉiu povis rigardi tiun ekspozicion. Ĝi vekis intereson de gazetaro kaj televido, kiuj raportis pri ĝi.

*Aleksej Kuznecov kaj Jelena Serova (Kostroma)*

## FONDIĜIS NOVA E-RONDETO

En Talica, en la Arbarteknika teknikumo, kie studis la Heroo de Soveta Unio, legenda militesploristo esperantisto Nikolao Kuznecov, estas ĵus fondita malgranda E-rondeto “Nikolao Kuznecov”. Bonvolu saluti ĝin per belaj poŝtkartoj kun tre klara skribo – ja ĉiuj estas apenaŭ komencintoj! La adreso estas: 623640, г.Талица Свердловской области, ул.Луначарского 81, Лесотехнический техникум им.Н.Кузнецова, Эсперанто-кружок «Николай Кузнецов».

*Vera Zlotnikova (Moskvo)*

## EKOLOGIO KAJ FOLKLORO EN RIGA

En Riga (Latvio) 01-07.07.2002 okazis 12-a Internacia Esperanto-Kongreso, en kiu partoprenis 200 homoj el 9 landoj. La temo de la Kongreso estis “Ekologio kaj folkloro”. La 3-an de julio kongresanoj plantis aceron “Espero” en la parko Grizinkalns, la 4-an de julio havis volontullaboron en Krimulda, en Gauja Nacia Parko, purigis ĉirkaŭaĵon kaj komencis konstruadon de Sankta labirinto ĉe la plej malnova preĝejo en Latvio “Kubeseles”. Dum la Kongreso okazis kunsido de AVE (Asocio de Verduloj Esperantistaj). Folkloran parton realigis 5 folkloraj kaj Esperantaj grupoj de Pollando kaj 5 grupoj de Latvio. Entute okazis 5 koncertoj por vasta publiko, senpagaj por aŭskultantoj, en 4 urboj en Latvio.

*(landa-agado)*

La renovigita kaj plibeligita retejo <Esperanto.net> nun povas rakonti pri Esperanto en 54<sup>1</sup> lingvoj, kaj tiu kvanto daŭre kreskas. La retejo estas unu el la plej malnovaj retaj informoj pri Esperanto, ĉiutage ĝin vizitas averaĝe ĉ. 1000 personoj. Multajn el ili ĝi nun salutas en ilia propra lingvo, ĉu la franca, ĉu la rusa, ĉu la japana k.t.p. En la lingvo de la vizitanto estas ankaŭ la klarigoj pri Esperanto kaj pri multaj ligiloj al la nacilingvaj retpaĝoj pri Esperanto. Kaj por tiuj, kiuj jam parolas en Esperanto, <Esperanto.net> prezentas kolekton de ligiloj al la plej gravaj E-retejoj kaj al Virtuala E-Biblioteko (ankoraŭ renovigata). La adreso de la retejo estas <www.esperanto.net>. Ekde junio ĝin prizorgas Universala E-Asocio.

*(e-inf)*

## FONDAĴO EŬROPO ĈE UEA

Jardeka strebo de eŭropaj esperantistoj realiĝis. La estraro de Universala Esperanto-Asocio aprobis la starigon de la Fondaĵo Eŭropo ĉe UEA. Kiel ĉiuj fondaĵoj ankaŭ ĉi tiu kolektos la kontribuojn de esperantistoj, kiuj aparte aprobas la agadon en Eŭropo kaj ĉe eŭropaj instancoj. La subteno ĉefe iros al la nove kreita Komunikad-Centro en Bruselo, kiu dum nur kelkaj monatoj jam pruvis sian utilecon. La tuj elspezablaj donacoj kaj la rento de la Kapitalo Eŭropo, kiu akumuliĝos tra la jaroj, estos uzataj interkonsente kun Eŭropa Esperanto-Unio. Por esperantistoj validas la kutimaj reguloj por pagi al UEA kun la indiko “por Fondaĵo Eŭropo”.

La Estraro de UEA decidis nomumi Trevor Steele ĝenerala direktoro por la periodo ĝis la 31-a de aŭgusto 2005 kaj elekti Stano-n Marček redaktoro de la jarkolekto 2003 de la revuo de la Asocio. La nombro de la individuaj membroj de UEA fine de la jaro 2001 estis 6428. **Renato Corsetti (Italia)**

*(Gazetaraj komunikoj de UEA)*

## IMEA EN PLJOS

En la antikva pitoreska ĉe-Volga urbo Pljos okazis la dua renkontiĝo Pljos-IMEA (07-09.06.2002), en kiu partoprenis ĉ.30 esperantistoj (komencantoj kaj spertuloj, sed ankaŭ startuloj). La programo estis mirinde riĉa kaj eventoplena: doktoro Wang (Soĉi) rakontis pri ĉina tradicia medicino, postsekvante lin Dima Ŝevĉenko (Moskvo) kaj mi “ci-gun”-umigis partoprenantojn. Pri la ĉina batalarto “u-ŝu” kaj pri la japana batalarto “ajkido”, pri iliaj medicinaj kaj psikologiaj aspektoj rakontis Dima Ŝevĉenko kaj Vlado Starikov (Ivanovo) respektive. Nia kara Etulino (Jelena Akimova el Niĵnij Novgorod) gvidis tre interesan kurson pri “Yumeiho Terapio” (aŭtoro Masajuki Sajonĝi) – prelegan parton kun demonstrado, kaj sekvate okazis praktika parto – ĉiu estis masaĝanto aŭ masaĝato. Mi certas: vi jam divenis, ke la temo de Pljos-IMEA estis medicino kaj sanigo (la sanigaj temoj estas tre aktualaj ĉi-jare: rememoru “Pensu sane – vivu sane” de OkSEJT-42).

Ni ne nur aŭskultis interesajn prelegojn, sed ankaŭ komune kuiris kaj manĝis vegetare kaj amase vizitis lokan banejon. Post la banejo tra la tuta nokto ni teumadis. Doktoro PaVo (Paŝa Volkov el Ivanovo) aranĝis por ni neforgeseblan tean ceremonion kun legado de haĵoj. La renkontiĝo estis ne nur saniga, sed memkompreneble esperantlingva: duono de la programeroj pasis Esperante, okazis E-kurso por komencantoj gvidata de Mirina (Irina Gonĉarova el Moskva reg.) per nova interesa metodo: komencantoj modlis objektojn el

<sup>1</sup> Je la 1-a de julio 2002 – Red.

modloplasto kaj samtempe “modlis” sian Esperanton.

Speciale mi rakontu pri ekologia flueto en nia renkontiĝo. Komencanta esperantistino Libera Torento (Ksenia Prilepskaja el Saĥalin-Moskvo) ankaŭ estas Greenpeace-anino. Ne ... pli bone mi diru – Verdpacanino. Ŝi kun helpo de Mirina organizis informadon pri Verda Paco tiel: komence du teamoj cerbesturme elpensis po ses asertojn pri VerdaPaco en demanda formo (facile respondeblaj – jes aŭ ne). Poste teamanoj demandis homojn en ĉirkaŭaĵo: ne nur la partoprenantojn, sed ankaŭ kunlaborantojn de la bazejo kaj loĝantajn tie pentristojn – ili tre miris. Sekve teamoj prezentis rezultojn en grafika formo. (La rezultoj tre surprizis Libera-n!) Kaj, fine, Libera rakontis pri “kio ja estas VerdaPaco”. Dum la sekva tago okazis ronda tablo pri ekologiaj problemoj.

Sed ne nur saniĝis ni – ni promenis tra la pitoreska urbeto, vizitis ĝiajn muzeojn. Bravuloj naĝis nude en la malvarma (brrr!!!) rivero Volga, miriginte lokanojn.

Mi tre dankas la ĉeforganizantojn de Pljos-IMEA-2 (Paŝa Volkov, Olga Kuleŝova). La aranĝon okazigis IMEA (Internacia Medicina Esperanta Asocio), kiu unuigas interesitojn (ankaŭ profesiulojn) pri medicino kaj Esperanto, pri aplikado de E-o en medicino.

Kaj fine mi diru: ne preterlasu eblecon ĝui bonan kompanion, bonan E-renkontiĝon kaj pitoreskan urbeton dum sekva somero. Ĝis la venonta Pljos-IMEA-3!

*Roman Bolŝakov (Moskvo)*

La 19-an de julio 2002 forpasis samideano Nikola Aleksiev – Honora Membro de Bulgara Esperanto-Asocio kaj de UEA, Honora Prezidanto de MEM, aŭtoro, tradukinto kaj redaktoro de pluraj libroj kaj artikoloj, sindona esperantisto kaj aktiva sociaganto. *Mariana Evlogieva (sekretario de BEA)*

## NOVAJ RETLISTOJ

En junio aperis du interesaj Esperantaj retlistoj: <per-esperanto-futbalo> kaj <per-esperanto-intelektludoj>. Aliĝi al ili eblas laŭ kutima por Yahoogroups maniero, sendinte malplanan mesaĝon al <per-esperanto-futbalo-subscribes@yahoogroups.com> aŭ <per-esperanto-intelektludoj-subscribes@yahoogroups.com> respektive kaj poste resendinte aŭtomatan respondon al la peto pri konfirmo.

## ESPERANTO-SERVOCENTRO

Al la demando “Kion donas al vi Esperanto” oni kutime aŭdas ordinarajn respondojn: novajn amikojn, interesajn renkontiĝojn, memorindajn vojaĝojn. Malofte eblas trovi la respondon “Esperanto helpas en mia profesio”, aŭ “Per Esperanto mi trovis novan laboron.” Ne estas sekreto, ke oni amase lernas la anglan ne pro belsoneco de la lingvo aŭ deziro koni kun la angla kulturo, sed pro profesiaj bezonoj, pro amasa aplikado de la angla en internaciaj ekonomiaj, sciencaj, politikaj, turismaj ktp sferoj. Sed ni, esperantistoj, ja certas, ke Esperanto multe pli taŭgas por tiuj celoj ol iu ajn nacia lingvo. Kial do oni ne uzas la eblojn de Esperanto – neŭtrala pont-lingvo por profesiaj celoj? Eble oni simple ne imagas pri tiuj ebloj, kaj ne scias, kiel efektive apliki Esperanton, – ne hipoteze iam estontece, sed jam nun, hodiaŭ.

En la strategia laborplano de UEA 2001/2010 la agado por Esperanto estis dividita je tri agadkampoj: informado, instruado kaj utiligado. La lasta signifas “... atingi ke la celataj homoj trovu ion valoran kaj interesan per sia uzado de la lingvo. Necesas transiri de la nuna situacio al vastskala utiligo de Esperanto por praktikaj celoj de la homa vivo, kiuj povas esti plej variaj, de scienca informiĝo ĝis komerco. Fakaj asocioj iĝu pli videblaj en landaj kaj internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj, kaj Interreto. Estu emfazo pri interkulturaj utiligoj kaj pri utiligoj propondeblaj kiel eble plej frue al memlernantoj.”

Por pridiskuti la temon, esplori jam ekzistantajn eblecojn de aplikado de Esperanto kaj por jam nun fari konkretajn ofertojn en diversaj profesiaj sferoj al ĝenerala neesperantista publiko estas fondita laborgrupo “Esperanto-Servocentro”. Estas lanĉita la tt-ejo <www.comail.ru/~esperanto/servocentro> (dume ne finfarita).

Ni invitas ĉiujn interesigantojn partopreni nian laboron, sendi siajn ideojn kaj projektojn rilatajn al la temo. Nia ret-adreso estas <esperanto@email.ru>; fakso/aŭtorespondilo (095)7059285 +22102; poŝta adreso: *Эсперанто-Сервисцентр, Украинский бул., 15, 4 эт., к.8; 121059 Москва.*

*kunordiganto de ESC Mikaelo Ĉertilov (Moskvo)*

## KONGRESO EN MONGOLIO

La 10-an de julio 2002 en la ĉefurbo de Mongolio Ulaanbaatar okazis la unua Mongola kongreso de Esperanto. La kongreson partoprenis ĉirkaŭ 30 mongolaj esperantistoj kaj ili diskutis pri disvastigado de Esperanto kaj progresigo de Esperanto-movado en la lando.

Malferman ceremonion de la kongreso partoprenis kaj gratulis s-ro M.Enkbold, urbestro de Ulaanbaatar, kaj s-ro N.Urtnasan, respondeca sekretario de Mongola Nacia Komisiono de UNESKO. Krome la kongreson partoprenis kiel honoraj gastoj s-ro Lee Chong-Yeong, vicprezidanto de UEA, s-ro Hori Yasuo, prezidanto de KAEM, s-ino Kim Ju, estrano de Korea Esperanto-Asocio kaj Jevgenij Delcov, reprezentanto de Rusia Esperantista Unio.

En la kadro de la kongreso okazis 4 fakkunsidoj: junula, virina, pedagogia kaj ekologia.

La 1-a Mongola kongreso ludis gravan rolon por kompreni celon kaj taskojn de Esperanto-movado en Mongolio kaj la internacia areno. Kvankam MEA dum nelonga tempo sukcese agadis pri konatigo kaj propagando de siaj celoj, taskoj kaj Esperanto al la mongola registaro, koncernaj ministerioj, oficejoj, amas-informiloj kaj mongola publiko, dum la kongreso klare sentiĝis, ke, unue, mongolaj esperantistoj devas plibonigi siajn scipovojn de Esperanto, due, MEA speciale atentu pri plimultigo de nombro de aktivaj kaj veraj esperantistoj, kiuj estus pretaj penegi diligente kaj vigle por Esperantismo.

Unu tagon antaŭ la kongreso mongolaj esperantistoj enmetis unuajn ŝtonojn de estontaj Esperantaj kolegioj kaj vilaĝo, kies terenoj estis donitaj de la urbestro.

*(landa-agado)*

## LA INFANA RENKONTIĜO EN GRÉSILLON

De la 13-a ĝis la 20-a de aprilo 2002 en Francio, en la kastelo Grésillon (Grezijon – Kulturdomo de franclandaj esperantistoj, kiu ĉiusomere okazigas E-kursojn por dezirantoj el la tuta mondo kaj kiu ĉi-jare festas sian 50-jaran jubileon) okazis vica Internacia Infana Renkontiĝo, kiun partoprenis 25 infanoj 8-14-jaraĝaj el Rusio, Ukrainio kaj Francio. Rusion reprezentis 10-persona grupo el Sankt-Peterburgo (gvidantino Svetlana Ejst). Dum la semajno antaŭtagmeze la infanoj diligente lernis la lingvon en diversgradaj E-kursoj kaj posttagmeze ili ĝuis

### Esperanto : des Russes à Grésillon



*la artikolo en franca gazeto*

la varian klerigan kaj turisman programon. Por la komenco estis esploritaj ĉirkaŭaĵoj de Gré-sillon kun famaj en la regiono dolmenoj kaj la kastelo de la 15-a jarcento en la apuda urbedo Baugé (Boje). La loka, tipe francprovinca, bazaro estis alloga kaj bunta pro diversaj varoj, produktoj, manĝaĵoj. Poste sekvis aliaj ekskursoj. Perbuse la partoprenintoj de la renkontiĝo veturis en la antikvan urbon Saumur (Somjur) ĉe la rivero Loire (Luaro). Reĝa kastelo sur la altaĵo kaj Nacia Lernejo de ĉevalrajddado kun belaj, bone prizorgitaj kaj trejnitaj ĉevaloj forte impresis la infanojn, same kiel la vizitoj al cerva kaj ŝafa bredejoj, kie la vizitantoj gustumis faritajn surloke pasteĉojn. La filmoj (pri la vivo en Grezilion kaj pri la sesio de Eŭroskola, okazinta marte en Strasburgo kun partopreno de junaj esperantistoj ankaŭ el Rusio), koncertoj kaj skeĉoj, diskoteko kaj adiaŭa lignofajro kompletigis la programon de la renkontiĝo, pri kiu la infanoj helpe de plenkreskuloj preparis la staĝrevuon skribe kaj desegne. Pri la Internacia Renkontiĝo de Infanoj raportis dufoje la franca gazeto “La Nouvelle République” (La Nova Respubliko).

La 19-an de junio je la 21.40 en la familio de Miŝa kaj Lena Povorin-oj naskiĝis la filo Vladislav. La knabo estas 55 cm longa kaj pezas 4.1 kg (per tio li je 200 g superis la aperintan en majo Grigorjevskij-idon). Gratulojn al la feliĉaj gepatroj!

Krome, la grupo el Rusio sukcesis dum 3 tagoj trarigardi Parizon, viziti la vidindaĵojn de la franca ĉefurbo. Kaj la infanoj plenumis sian revon – veturis al Disnejlend. Dumvoje la grupo trarigardis Berlinon, vizitis ĝian faman Zoogardenon. Vespere okazis la renkontiĝo kun lokaj geesperantistoj. La vojaĝon de la grupo organizis V.Seguro kaj T.Loskutova. Por la sekvonta somero (dum julio-aŭgusto) estas planataj vojaĝoj al la kastelo Gresillon. Pri la detaloj vi povas informiĝi laŭ la retadreso <lota49@mail.ru>.

*Tatjana Loskutova (Ivanova E-klubo)*

## RETAJ ALIĜILOJ POR UK KAJ IJK EN 2003

En la retejo <www.uea.org> aperis la unuaj informoj kaj la reta aliĝilo por UK-88 en 2003 en Gotenburgo (Svedio). Unuafoje en la praktiko de UEA tiu varianto de aliĝado estos menciita ankaŭ en la tradicia papera UK-aliĝilo. Por aliĝi pere de ĝi iru al “Kongresoj” – “88-a UK” – “reta aliĝilo”. Estas elŝutebla ankaŭ versio en la formato PDF.

*(Gazetaraj komunikoj de UEA)*

La aliĝilo por IJK-59 en 2003 en Lesjöfors (Svedio) nun elŝuteblas ĉe <<http://www.tejo.org/ijk/2003/>>. Se vi havas iujn demandojn, ne hezitu kontakti la organizantojn laŭ la adreso <ijk.kunordiganto@tejo.org>.

*(landa-agado)*

## HISTORIISTOJ DE ĈIUJ LANDOJ – UNUIĜU!

Iam dum la glora SEJM-periodo estis proponoj organizadi E-aranĝojn, dediĉitajn al iu temo, alivorte – renkontiĝojn laŭ interesoj. Nun tiu ideo estas foj-foje efektivigata. Plurajn jarojn estas organizata EoLA en diversaj urboj; moskvanoj organizadas regule kunsidojn de Literatura klubo... Mi ŝatus proponi organizi ankoraŭ unu renkontiĝon laŭ interesoj – por tiuj, kiuj ŝatus esplori historion de la E-movado, aŭ almenaŭ havas pri tio intereson. Do, se sin anoncos almenaŭ 7 – 10 interesiĝantoj, mi pretas en nia urbo, en Ĥarkiv fine de februaro – komence de marto organizi renkontiĝon-konferencon por histori-ŝatantoj. Bonvolu sin anonci ĉe Dmitrij Cibulevskij, p/k 9307, UA-61003, Ĥarkiv-3, Ukrainio aŭ retpoŝte <jlupicky@mail.ru> (por Cibulevskij).

*Dmitrij Cibulevskij (Ukrainio)*

# LIBRA REVUO

## BELARTAJ KONKURSOJ 2002

### *premitoj laŭ la diversaj branĉoj*

**Infanlibro de la jaro** – 3 konkurintoj – Unua premio: “Kuniberto kaj Kilevamba” (G. Pausewang, tradukis Nora Caragea).

**Prozo** – 18 konkuraĵoj – Unua premio: “Sekretoj” (Paulo Sérgio Viana, Brazilo); Dua premio: “Malsukceso” (Dani Spielhofer, Aŭstrio) kaj “Pro savo de Homo” (Lena Karpunina, Germanio).

**Teatraĵo** – 3 konkuraĵoj – premioj ne aljuĝitaj.

**Poezio** – 46 konkuraĵoj de 17 poetoj – Unua premio: “Floraj hajkoj” (Anatole Taras Lubovich, Usono); Dua premio: “Kio okazis?” (Anja Karkiainen, Finnlando); Tria premio: “Arte fari” (Marie-France Conde Rey, Francio).

**Eseo** – 5 konkuraĵoj – Unua premio: nealjuĝita; Dua premio: “Mezuro de informokvanto” (Christian Rivière, Francio); Tria premio: “Diverseco: defio, ne minaco” (István Ertl, Belgio).

**Kanto** – Unua premio: “Preĝo el inter ruinoj” (Anatole Taras Lubovich, Usono); Dua premio: “Homarano” (Alejandro Cosavella, Argentino); Tria premio: “Jula enigmo” (muzik: Christian Spitzer, teksto: Christian Rivière, Francio).

**Vidbendo** – Unua premio: “Plurspecaj eroj” (Sylla Chaves, Brazilo); Honora mencio: “Felix Romuliana” (E-grupo de Zajeĉar, Serbio).

*(Abonu.Com)*

## LA NOVA PIV

La nova Plena Ilustrita Vortaro jam estas akirebla en la libroservo de UEA.

La nova eldono, kiun ĉefredaktis akademiano Michel Duc Goni-naz, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokitaj ne plu en la lastaj paĝoj, sed enkorpigitaj en la teksto mem. Formato: 150x255 mm, 1265 paĝoj. Eldonis SAT.

La Libroservo de UEA vendas ĝin kontraŭ 78 eŭroj plus la kutimaj aldonaĵoj – 10% sendokostoj; 6% imposto (nur por EU-landoj). Per mendoj de 3 ekz. samtempe (al la sama adreso) la LS donas sesonan rabaton.

*(Gazetaraj komunikoj de UEA)*



## LIRO-2002

“La Ondo de Esperanto” invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en tradicia literatura konkurso Liro-2002. Liro-2002 havas kvin branĉojn.

1. Originala prozo: ne pli ol 30 mil literojn longa.
2. Originala poezio: la amplekso ne estas limigita.
3. Traduka poezio el la rusa lingvo: “Расточитель” de Fjodor Sologub.
4. Traduka prozo el la rusa lingvo: “Тамань” de Miĥail Lermontov.

5. Traduka prozo el la angla lingvo: “The Lost Sanjak” de Saki.


En ĉiu el la originalaj konkursoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Bonvolu sendi tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro-2002 (RU-236039, Kaliningrad, p/k 1248). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ la 01.11.2002.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj. La originalajn tekstojn de la tradukotaj verkoj petu ĉe la sekretario poŝte kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono, aŭ elŝutu el la reto <<http://Esperanto.Org/Ondo>>.

La laŭreatoj de Liro-2002 ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31.12.2004 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en “La Ondo de Esperanto”, libroforme kaj elektronike, kondiĉe ke ili avertos pri tio la aŭtoron ĝis 01.03.2003.

*Halina Gorecka (Kaliningrad)*

## NOVA DISKO EL TIĤVIN



Aperis nova muzikdisko “Blanka nokto” kun E-kantoj en plenumo de tiĥvina ensemble “Espero” (Vera Vlasova, Tatjana Belova, Larisa Selivanova). La diskon konsistigis 15 originalaj kaj tradukitaj kantoj, aŭtoroj kaj tradukintoj de la plej multaj estas Vladislav Rajskij kaj Mikaelo Bronŝtejn. Krom la jam konataj kantoj (kiel “Leningrada valso”, “Gulĉataj”, “Kanto pri Tiĥvin”, “Blanka nokto” k.a.) estas ankaŭ la novaj. La disko kunhavas broŝuron kun la tekstoj. Dezirantoj akiri la diskon bonvolu kontakti Aleksandr Belov rete <[belov@tihvin.spb.ru](mailto:belov@tihvin.spb.ru)> aŭ poŝte 187500, Leningrada reg., Tiĥvin, 3 – 13 – 30.

## VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO

**Boris Kolker.** *Vojaĝo en Esperanto-lando.* Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Dua eldono reviziita kaj renovigita. Redaktoro Viktor Aroloviĉ. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2002. 278 p. Prezo 18 eŭroj; triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Tiel nomiĝas la eminenta verko de akademiano Boris Kolker, ĵus eldonita de UEA. La libro apartenas al malofta ĝenro de perfektigaj kursoj de Esperanto, kiuj pro klaraj kialoj estas multe malpli oftaj ol la startigaj lerniloj. Aparte ĝin elstarigas la fakto, ke ĝi estas samtempe gvidlibro pri la Esperanta kulturo. “La ambiciaj celoj de tiu ĉi neordinara lernolibro estas instrui kreadon de la literatura lingvo kaj kreskigi emocian ligitcon al Esperanto”, – skribis Boris Kolker, prezentante la libron.

Tio estas la dua eldono de la libro, radikale relaborita kaj internaciigita. La instruado okazas per la uzo de verkoj de Ludoviko Zamenhof, Claude Piron, István Nemere, Julio Baghy, John Wells, Marjorie Boulton, Albert Goodheir, Emilija Lapenna, Cezaro Rossetti, Lorjak, Kolomano Kalocsay kaj dudeko da aliaj konataj kaj ne tre konataj, sed interesaj



aŭtoroj. La tekstojn akompanas E-temaj fotoj, zorge elektitaj el la foto-arkivo de la Centra Oficejo.

La antaŭa Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller, dum kies direktorado la libro komencis prepariĝi al la presado, skribis pri ĝi tiel: “La libro estas abunde ilustrita kaj fakte ne ekzistas alia libro por simila celo, kiu povas rivali kun ĝi. ... Mi nur bedaŭras, ke la libro ne povis aperi jam dum mia oficperiodo...” Lin reeĥas Trevor Steele, kiu daŭrigis la laboron pri la preparado de la eldono: ““Vojaĝo en Esperanto-lando” estas certe la plej riĉe ilustrita originala libro en nia eldonhistorio”.

La libro akireblas en la Libroservo de UEA. Kelkaj lecionoj el la libro troviĝas en la reto laŭ la adreso <<http://www.esperanto.mv.ru/Vojaĝo/index.html>>, la unuajn reeĥojn oni povas legi en <<http://www.edukado.net/instruilo.jsp?id=144>>.


*(Gazetaraj komunikoj de UEA)*

## DU ALIAJ NOVAJ ELDONAĴOJ DE UEA

UEA eldonis du novajn librojn: “Esperanta frazeologio” de Sabine Fiedler kaj “Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj”, kies originalo estis eldonita de EBLUL, la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj.

ESPERANTA FRAZELOGIO. Ĉu Esperanto havas ankaŭ sukajn parolturnojn, bildecaĵn komparojn, idiomaĵojn, proverbojn, stereotipajn formulojn? Ĉu en la projekto, kiun Zamenhof proponis al la mondo, estis indikoj kiel esprimi emociojn, kiel montri diversajn “tonojn” (sarkasmon, laŭdon, intimecon)? Ĉu parolantoj transprenas la bildesprimojn el siaj gepatraj lingvoj aŭ Esperanto dum sia komunika historio kapablis krei sufiĉe originalajn proprajn bildojn? Se nacilingvaj apartenaĵoj regas, ĉu la internacia komprenebleco de la komuna lingvo devas suferi? Sabine Fiedler, germana specialistino pri la angla lingvo kaj aktiva esperantistino, esploras tiujn demandojn kaj aliajn, kiuj devus interesi ĉiun amanton de nia lingvo kaj literaturo. Ŝia studo baziĝas sur legado de la ĉefaj Esperantaj periodaĵoj, de beletro (originala kaj tradukita) kaj ankaŭ sur la parola lingvo. El sia iom nekutima vidpunkto la libro atentigas pri la eble unika taŭgeco de Esperanto kiel transkultura, translingva komunikilo. La nuna libro baziĝas sur la pli ampleksa germanlingva disertaĵo de la aŭtorino. Ĝi enhavas 140 paĝojn da teksto kaj profesnivelaĵn bibliografion kaj indeksojn.

DISKUTLIBRO PRI MALPLI UZATAJ LINGVOJ. EBLUL (oficiala anglalingva titolo: European Bureau for Lesser Used Languages) atentigas nin, ke en Eŭropo almenaŭ 50 milionoj da homoj parolas en unu el tiuj malpli uzataj lingvoj (kaj la nombro ne inkluzivas enmigrintojn). La ĵus eldonita Diskutlibro argumentas, ke lingva diverseco estas malpli en Eŭropo ol en la aliaj kontinentoj, sed aldonendas, ke la centoj da indiĝenaj lingvoj de Nordameriko kaj Aŭstralio grandparte malaperis aŭ estas mortantaj. La libreto aliras tiujn lingvojn el diversaj vidpunktoj (ekzemple, la fakta ekzisto kaj funkcio de la lingvo, la homrajta kaj jura flankoj) en formo de demando/aserto kaj respondo. Sed oni povus resumi per unu frazo: tiuj lingvoj pliriĉigas la vivon de siaj uzantoj, kaj estus domaĝe ilin perdi – kaj tiu perdo bedaŭrinde eblas. Evidente jen kampo, kiu interesas ankaŭ nin, esperantistojn. La libro havas 60 lukspaperajn paĝojn plaĉe ilustritajn.



*(Gazetaraj komunikoj de UEA)*

## VIRTUALA KONFERENCO PRI EROŝENKO


Ĉi-jare ni solenos la 50-an datrevenon de morto de Vasilij Eroŝenko. Ni pensas, ke vi scias pri ĉi tiu neordinara homo kaj legis liajn verkojn. Ni pensas ke vi, same kiel ni, scias lian biografion – tiun de vera esperantisto kaj mirinda homo. Sed ĝis nun ni preskaŭ ne havas seriozajn esplorojn de Eroŝenko-verkado en kunteksto de lia tempo. Oni ofte esploris lian vivon aŭ la verkadon kiel interesan kuriozon, sed ne kiel eventon de la kulturo de modernismo. Komenco de 20-a jarcento donis modernismajn tendencojn tutmonde. En Rusio (hejmlando de Eroŝenko) ĉi tiun tempon oni nomis la Arĝenta Epoko, ĝi estis epoko de A.Blok, A.Aĥmatova, V.Majakovskij, S.Jesenin, M.Cvetajeva.

Ni volas analizi la verkojn de V.Eroŝenko konforme al lia tempo, en kunteksto de rusia Arĝenta Epoko, en kunteksto de tiama literatura procezo en Japanio kaj Ĉinio, en kunteksto de tutmonda modernismo. Por tio ni lanĉis la virtualan konferencon “Eroŝenko kaj lia tempo”. Se vi volas partopreni en la konferenco, skribu al ni laŭ la adresoj: <gosha@kolomna.ru>, <gosha-p@narod.ru>, <patlan\_yu@ukr.net>, <mine.yositaka@nifty.ne.jp>. Niajn materialojn vi povas vidi en nia ttt-ejo <www.goshap.narod.ru>. Ni petas sendi al ni: 1. biografian informon pri vi; 2. tezojn de via artikolo; 3. la adreson (paperpoŝtan kaj retpoŝtan).

Ni atendas viajn antaŭmendojn ĝis la 15-a de septembro kaj la artikolojn – ĝis la 30-a de novembro 2002. Poste ni publikigos viajn materialojn en nia ttt-ejo. Se vi povas helpi al ni eldoni ĉi tiujn materialojn, ankaŭ pri tio informu nin aparte laŭ supre indikitaj adresoj. Se vi povas traduki naclingvajn materialojn en Esperanton, ankaŭ informu nin.


***Sergej Proĥorov – kandidato de filologio, docento***  
*(Rusio, La Ŝtata Instruista Supera Lernejo en la urbo Kolomna)*

***Julija Patlanj – filologino***  
*(Ukrainia Societo de Roerich – filio de Internacia Centro de Roerich)*  
***Mine Yositaka – redaktoro de Eroŝenko-libroj (Japanio)***



## NOVA ELDONO DE BOKAREV-VORTARO


Aperis nova eldono de Esperanto-rusa Vortaro de J.A.Bokarev. Ĝi estas reviziita kaj kompletigita fare de Jurij Finkel (Uljanovsk) kaj Igor Galiĉskij (Severodvinsk), enhavas 308 paĝojn A5 kaj ĉirkaŭ 29000 vortojn. La vortaro aĉeteblas en la Libroservo de REU (vidu la adreson en la 3-a kovrilpaĝo).



... kaj provante fiksi la realecon de Dio, ni konstante malplifortigas tian realecon. Dio, kombanta sian barbon kaj vidata de ni – estas jam malgranda venko de ateismo, gesinjoroj!

F.Iskander, "Sandro el Ĉegem", ĉap. 30

**Mikaelo  
BRONŜTEJN  
(Tihvin)**



**AL...**

Nin trankviligos tempo, amata.  
Tamen, en nia nuna maturo  
ĉu zorgu ni pri l' farto trankvila?  
Nin trankviligos tempo, amata.  
Sed dume la amema naturo  
ne hastu al sensento humila.

Ni restu en la ĝuo de l' vivo  
dum tiu estas iom ĝuinda  
kun etaj sed plej karaj plezuroj.  
Ni restu en la ĝuo de l' vivo,  
ni frandu l' vivon nun, mia linda,  
ni amu, simple amu, sen ĵuroj.

Ja am' ne havas finon, amata.  
Ĉu vere trankviligos la tempo  
nin, kiuj ame l' sorton oponas?  
Jes, am' ne havas finon, amata.  
La finon havas nur la atendo.  
Ĉu vi al mi l' atendon pardonas?

**AL...**

Apenaŭ flagranta aŭror'  
la alojn vastigas dum veno, –  
la korojn denove  
incitas bontrove  
printempa mateno.

Apenaŭ dorminta konval'  
ektremos pro l' venta impeto, –  
la vangojn lumigos,  
l' okulojn varmigis  
feliĉa rideto.

Apenaŭ sopira anim'  
vekiĝos post vintra amaro, –  
ĝin venos kontente,  
okupos plensente  
la freŝo de l' marto.  
Kaj dance alflugas la tag',  
kraĉante al sobro, prudento.  
Jen tiel flamigas,  
jen tiel amigas  
la mart' kaj la vento.

## DIABLIDOJ, KIUJ SIDAS EN NI

Nin foje kaptas arda impet', –  
ĉu vi jam spertis? –  
Ja volis mi oponi ĝin, sed  
ne tute certis,  
ĉu bonas aŭ makabras ekflug'  
al freŝa tigo,  
kaj eĉ plezure mergis min plu  
en la intrigo.  
Do, kiu kulpas, se la  
impeto kultas sen lac',  
nin eligante el la viv-harmoni'  
anstataŭ paca spertig'  
al senaŭgura intrig'? –  
Diablidoj, kiuj sidas en ni.  
Bruegas ŝtormoj super la kap',  
sed jen la samo:  
ne pensas tute ni pri l' eskap' –  
ĉu estas amo?  
Kaj agas malgraŭ kaj spite al  
ĉieaj klaĉoj,  
sen timo pri batal' aŭ pri fal' –  
feliĉulaĉoj.  
El nia dorma rutin'  
nin pelas rava obstin',  
kaj onidiroj restu nur kalumni'!  
Ja nur bonŝanco, ne pek',  
ke ekbobelas por vek'  
diablidoj, kiuj sidas en ni.  
Vizie ŝvebas en mia nokt'  
la minca mano,  
mielas lumo de lun-kanot'  
tra l' diafano.  
Tenera ondo en la anim'  
leviĝas kreske –  
eĉ rememoroj influas min  
nur eferveske.

El mia pensa senord'  
naskiĝas hela akord'  
por nia kanto nova aŭ simfoni',  
kaj mi konscias en fin',  
ke devas mi danki vin, –  
diablidoj, kiuj sidas en ni.

---

*nova traduko el Iosif Brodskij*

\* \* \*

Holando estas plat-ebena lando,  
transiras ĝi finfine en la maron,  
kaj ĝi – la maro – estas do finfine  
Holando. Nekaptitaj maraj fiŝoj  
konversacias en holanda lingvo,  
certante, ke liber' ilia estas  
miksaĵo de gravuro kaj falbalo.  
Ne eblas en Holando surmontiĝi,  
soife morti; eĉ malpli facilas  
postlasi klaran spuron, per biciklo  
lasinte hejmon. Des pli – fornaĝinte.  
Holando tenas ĉiajn rememorojn.  
Neniu digo stopos. Tiusence  
mi vivas en Holando eĉ pli longe,  
ol lokaj ondoj, foren ruliĝantaj  
sen cel'. Simile al ĉi tiuj versoj.

1993

*tradukis Grigorij Arosev*

---

Dum festado de la ĵus alveninta jaro 2000, ĵurnalisto  
demandas al iu strata preterpasanto:  
– Kiujn planojn vi havas por ĉi tiu jarmilo?  
– Sufiĉe moderajn. Plejparton de la jarmilo mi estos  
morta.

## John CHEEVER

John Cheever [ĝon ĉiver] (1912 – 1982). Usona novelisto kaj romanisto. Priskribis, ofte pere de fantasto kaj ironia komedio, la vivon, morojn kaj moralon de la mezklasa, apudurba Usono. Usona kritikisto J. Leonard nomis lin “Nia Ĉehov de la apudurboj” pro lia kapablo kapti dramon kaj malĝojon de la vivo de siaj herooj, malkaŝante la “subterajn torentojn”. Li estis forpelita el Thayler Akademio kiam li havis 17 jarojn, kaj tio iĝis la temo de lia unua novelo, publikigita en “New Republic”. Ĉefaj verkoj: romanoj “*The Wapshot Chronicle*” (1957), “*The Wapshot Scandal*” (1964), and “*Falconer*” (1977).

“La naĝanto” (originale “*The Swimmer*”) estis publikigita en “*The New Yorker*”, 1964. En 1968 aperis samnoma filmo, kie ĉefrolis Burt Lancaster.

### LA NAĜANTO

Ĝi estis unu el tiaj mezsomeraj tagoj, kiam ĉiu ajn sidas apude, dirante: “Mi hieraŭ vespere *drinkis* tro multe.” Vi eble jam aŭdis tion flustrata de paroĥanoj, elirantaj el la preĝejo; aŭdis ĝin el la lipoj de la pastro mem, luktanta kontraŭ sia propra sutano en *vestiarium*<sup>1</sup>; aŭdis ĝin en la golfaj kampoj kaj tenisejoj; aŭdis ĝin el la naturaj rezervejoj, kie la gvidanto de Audubona grupo<sup>2</sup> suferas pro terura postebrio. “Mi *drinkis* tro multe,” – diris Donald Westerhazy. “Ni ĉiuj *drinkis* tro multe,” diris Lucinda Merrill. “Verŝajne, tio okazis pro la vino,” – diris Helen Westerhazy. “Mi *drinkis* tro multe da ĉi tiu klareto.”

Tio estis ĉe la rando de la baseno, en la korto de la Westerhazy’oj. La baseno, nutrata de arteza puto, tro riĉa je fero, estis pale verda. Estis bona tago. Okcidente videblis masiva monto de kumuluso, tiom simila al urbo, vidata el malproksimo, de la pruo de proksimiĝanta ŝipo, ke ĝi povis havi propran nomon. Lisbono<sup>3</sup>. Hackensak<sup>4</sup>. La suno varmegis. Neddy Merrill estis sidanta ĉe la verda akvo, unu mano estis en la akvo, la alia ĉirkaŭis glason da ĝino. Li estis svelta – ŝajne li havis tiun specialan sveltecon de junaĝo – kaj kvankam li estis jam for de la juneco, ĉi-matene li forglitis de sur sia balustrado kaj, trotante en la direkto de la kafa odoro el la manĝejo, li ŝmace padelis la dorson de bronza Afrodito, staranta surtable en la koridoro. Oni povus kompari lin kun somera tago, precipe ties lastaj horoj, kaj kvankam al li mankis tenisa rakedo aŭ sporta veltola sako, li sendube kreis la impreson de juneco, sporto kaj bona vetero. Li ĵus estis naĝanta kaj nun li spiris stertore kvazaŭ li kapablus enpulumigi ĉiujn komponantojn de la momento, la varmegon de la suno, la intensecon de la plezuro. Ŝajnis, ke ĉio ĉi enfluis lian bruston. Lia propra domo troviĝis en Bullet Park, ok mejlojn suden, kaj tie kvar liaj belegaj filinoj verŝajne jam tagmanĝis kaj nun eble estis ludantaj tenison. Poste venis al li la ideo, ke ekirinte sud-okcidenten li povus plirektigi la von kaj atingi la hejmon naĝe.

Lia vivo ne estis izolita kaj la admiron de ĉi tiu observo oni ne povus ekspliki per ebleco de fuĝo. Li ŝajne vidis per la okuloj de kartografo la vicon de naĝbasenoj, kvazaŭ subteran torenton, kiu serpentumis tra la distrikto. Li faris la eltrovon, li kontribuis al la moderna geografio; li nomus la torenton Lucinda<sup>5</sup>, omaĝe al sia edzino. Li ne estis burleskulo nek stultulo, sed li estis sendube originala kaj havis malklaran kaj modestan impreson pri si mem

<sup>1</sup> Vestiarium (lat.) – sakristio (tiu ĉi kaj sekvaj rimarkoj apartenas al la redaktoro)

<sup>2</sup> Audubona grupo – naturprotektita societo en Usono

<sup>3</sup> Lisbono – ĝi estas ne nur la ĉefurbo de Portugalio, sed ankaŭ kvar malgrandaj urbetoj en Usono

<sup>4</sup> Hackensak – malgranda urbeto apud Nov-Jorko

<sup>5</sup> Lucinda – la senco de ĉi vorto estas “hela”, “diafana”; la nomo de la ĉefprotagonisto ankaŭ havas sencen: Neddy signifas “azeneto”, Merrill – “gaja”

kiel pri iu legenda persono. La tago estis belega, kaj al li ŝajnis, ke la longa naĝado povus plivastigi kaj celebri ties belecon.

Li demetis la sveteron, kiu pendis sur liaj ŝultroj, kaj plonĝis. Li havis neeksplikeblan malestimon al viroj kiuj ne ĵetas sin en basenojn. Li naĝis per abrupta kraŭlo spirante aŭ ĉe ĉiu ajn padelumo, aŭ ĉe ĉiu kvara padelumo, kaj kalkulante ie en profundo de sia konscio la unu-du unu-du'ojn de la krurmovoj. La stilo ne estis dezirebla dum la longdistanca naĝado, sed la hejmiĝo de la naĝado seligis la sporton per certaj kutimoj, kaj en lia mondoparto la kraŭlo estis tute kutima. La brakumo kaj subteno de facila verda akvo ŝajne donis malpli da plezuro ol la reveno al la natura stato, kaj li volonte naĝus sen naĝkalsoneto, sed tio ne estis ebla rilate al lia projekto. Li eltenis sin sur la malproksiman parapeton de la baseno – li neniam uzis la eskalojn – kaj ekiris tra la kampeto. Kiam Lucinda demandis, kien li iras, li diris, ke li intencas naĝi hejmen.

La solaj uzeblaj de li mapoj kaj skemoj estis memorfiksitaĵoj aŭ imagitaĵoj, sed eĉ ili estis sufiĉe klaraj. La unuaj estis la Graham'oj, la Hammer'oj, la Lear'oj, la Howland'oj kaj la Crosscup'oj. Poste li iros trans la strato Ditmar al la Bunker'oj, kaj post mallonga piedmarŝo, al la Levy'oj, la Welcher'oj, kaj publika baseno en Lancaster. Poste estos la Halloran'oj, la Sachs'oj, la Biswanger'oj, Shirley Adams, la Gilmartin'oj kaj la Clyde'oj. La tago belegis, kaj lia vivo en la mondo tiom riĉa pri la akvo estis beno, ĉiela donaco. Lia humoro soris kaj li kuris tra la herbejo. Lia vojo hejmen laŭ nekutima itinero donis al li la senton ke li estas pilgrimanto, esploristo, la homo de destino, kaj li sciis, ke dum la tuta vojo li trovados amikojn; la amikoj viciĝos surborde de la rivero Lucinda.

Li iris tra la heĝo inter la lando de la Westerhazy'oj kaj la lando de la Graham'oj, trairis sub kelkaj florantaj pomarboj, trairis preter la ŝedo, kie troviĝis la pumpilo kaj filtrilo, kaj eliris ĉe la baseno de la Graham'oj. “Jen, Neddy,” – diris s-ino Graham, – “kia bela surprizo. Dum la tuta mateno mi estis provanta kapti vin ĉe telefono. Jen, permesu doni al vi drinkon.” Li ekvidis tuj, samkiel ajna esploristo, ke oni devas rilati diplomate al gastamaj kutimoj kaj tradicioj de la aborigenoj, se oni volas atingi la celokon. Li ne volis inciti troan intereson aŭ ŝajni malĝentila al la Graham'oj, nek havis tempon por pasigi tie. Li tranaĝis la basenon laŭlonge kaj aliĝis al ili sub la suno, kaj estis savita post kelkaj minutoj dank' al du plenaj aŭtoj da amikoj el Connecticut. Dum ili brue intersalutiĝis, li sukcesis forgliti. Li trairis ĉe la fronto de ilia domo, paŝis trans la dorna heĝo kaj ekiris tra la vaka tereno al la Hammer'oj. De sia rozbedo s-ino Hammer vidis lin preternaĝi, kvankam ŝi ne certis, kiu estis li. La Lear'oj aŭdis lin plaŭdi sub la malfermitaj fenestroj de ilia loĝĉambro. La Howland'oj kaj la Crosscup'oj ne estis hejme. Post la tereno de la Howland'oj li transiris la straton Ditmar kaj ekiris al la Bunker'oj, de kie li povis aŭdi, eĉ el malproksimo, la bruon de vesperfesteno.

La akvo refraktis la sonon de voĉoj kaj rido kaj kvazaŭ subtenus ĝin en mezaero. La baseno de la Bunker'oj estis sur altaĵo kaj li supreniris kelkajn ŝtupojn al teraso kie drinkis dudekkvin aŭ tridek virinoj kaj samkvante da viroj. La sola persono el la akvo estis Rusty Towers kiu floris en la baseno sur kaŭĉuka blovmatraco. Ho, kiom belaspektaj kaj abundaj estis la bordoj de la rivero Lucinda! Prosperantaj viroj kaj virinoj kolektiĝis apud sapfirkolora akvo, kaj kelneroj en blankaj jakoj disdonadis al ili malvarman ĝinon. En la ĉielo ruĝa “de Haviland”<sup>1</sup> cirkulis kaj cirkulis kaj cirkulis simile al admirita ludanta infano. Ned sentis pasantan allogon de la sceno, tenerecon al la kunveno, kvazaŭ ĝi estus io tuŝebla. Ie lontane li ekaŭdis tondron. Tuj kiam Enid Bunker ekvidis lin, ŝi komencis krii: “Ho, vidu, kiu venis! Kia belega surprizo! Kiam Lucinda diris, ke vi ne venos, mi certis ke mi *mortos*.” Ŝi direktis sin al li tra la amaso, kaj kiam ili finis interkisasdon, ŝi kondukis lin al la

---

<sup>1</sup> Lerna aviadilo

stardrinkejo; la agon bremsis la fakto, ke li haltis por kisi ok aŭ dek virinojn kaj premi la manojn al la sama kvanto da viroj. Ridetanta bufedisto, kiun li vidis ĉe cento da aliaj festenoj, donis al li ĝinon kaj tonikon, kaj li staris dum kelkaj sekundoj apud la stardrinkejo, timante, ke li estos kaptita en konversacion kaj estos detenita en sia vojaĝo, kaj kiam li estis jam preskaŭ ĉirkaŭita de la homoj, li plongis en la basenon kaj eknagiis flanke por eviti kolizion kun la matraco de Rusty. Ĉe la fora rando de la baseno li preteriris la Tomlinson'ojn kun vasta rideto kaj ektritis la ĝardenan padon. La gruzo vundadis liajn piedojn, sed tio estis la sola malplezuraĵo. La festenantoj estis ligitaj al la baseno, kaj irante al la domo li aŭdis brilan, akvecan sonon de fadantaj voĉoj, aŭdis la bruon de radio el la kuirejo de la Bunker'oj – tie iu estis aŭskultanta la basbalan matĉon. Dimanĉa tagmezo. Li trovis la vojon inter parkitaj aŭtoj kaj poste laŭ herbkovrita rando de ilia alveturejo direktis sin al Alewives' Lane. Li ne volis ke oni vidu lin en la strato, vestitan nur en naĝkalsonego, sed trafiko forestis kaj li ekiris la mallongan distancon al la alveturejo de la Levy'oj, markita per la signo “privata tereno” kaj verda tubo por “*New York Times*”. Ĉiuj pordoj kaj fenestroj de la granda domo estis malfermitaj, sed neniu videblis, kaj eĉ hundo ne bojis. Li turnis sin ĉe la flanko de la domo, sin direktante al la baseno, kaj rimarkis, ke la Levy'oj estis ĵus forveturintaj. Glasoj kaj boteloj kaj teleroj staris sur la tablo ĉe profunda flanko de la baseno, apud banejo aŭ laŭbo, ornamita per pendantaj japanaj lanternoj. Tranaĝinte la basenon, li prenis glason kaj verŝis por si ĝinon. Tio estis jam kvara aŭ kvina drinko, kaj li estis tranaĝinta preskaŭ duonon de la rivero Lucinda. Li sentis sin laca, purigita kaj feliĉa esti sola ĉi-momente; feliĉa pro ĉio.

Sendube, proksimiĝis ŝtormo. La fosto de kumuluso – tiu urbo – jam leviĝis kaj malheliĝis, kaj dum li estis sidanta ĉi tie, li denove ekaŭdis la tamburumon de tondro. La “de Haviland” plu cirkulis en la ĉielo, kaj Ned preskaŭ povis aŭdi kiel la piloto ridas pro la tagmeza plezuro; sed kiam aŭdiĝis nova tondra eksplodo, li ŝin direktis hejmen. Aŭdiĝis la fajfo de trajno, kaj Ned ekinteresiĝis, kioma horo povus esti. Ĉu la kvara? Aŭ la kvina? Li imagis provincan stacidomon en ĉi horo, kie atendas la lokan trajnon kelnero en smokingo, kovrita per mantelo, iu gnomo kun bukedo volvita per gazeto, kaj virino, kiu ĵus estis ploranta. Subite malheliĝis; tio estis la momento, kiam la stultaj birdoj ŝajne aranĝas sian kanton en iun akutan kaj agnoskan proklamon de la ŝtorma veno. Poste venis kvieta sono de la akvo, falanta el la kverka krono al lia dorso, kvazaŭ iu malfermus kranon. Poste el la kronoj de ĉiuj altaj arboj venis la bruo de torentoj. Kial li tiom ŝatis ŝtormojn, kion signifas lia ekscito, kiam la pordo svinge malfermiĝas kaj la akvo, pelata de la vento, inundas la ŝtuparon; kial la simpla tasko – fermi la fenestrojn de la malnova domo – ŝajnas esti ĝustatempa kaj urĝa; kial la unuaj signoj de la ŝtormo sonas por li kiel senduba sciigo pri bonaj novaĵoj, ĝojo, feliĉo? Poste eksplodis tondro, aperis la odoro de pulvo, kaj la pluvo ekvipis la japanajn lanternojn, kiujn s-ino Levy aĉetis antaŭpasintjare en Kyoto, aŭ tio estis unu jaron pli frue?

Li restis en la laŭbo de la Levy'oj ĝis kiam la ŝtormo ĉesis. La pluvo malvarmigis la aeron, kaj li ektemis pro malvarmo. La forto de la vento nudigis la aceron, forŝiris ties ruĝajn kaj flavajn foliojn kaj disŝutis ilin sur la herbejon kaj la akvan surfacon. Estis mezo de la somero, kaj la arbo estis verŝajne infektita, sed ĉi tiu signo de aŭtuno kaŭzis iun strangan aflikton. Li brakumis siajn ŝultrojn, malplenigis la glason kaj ekiris al la baseno de la Welcher'oj. Por tio li devis transiri la rajdan ringon de la Lindley'oj, kaj surprize li trovis ĝin kovrita per alta herbo kaj la saltobstakloj estis malmuntitaj. Li ekinteresiĝis, ĉu la Lindley'oj vendis siajn ĉevalojn, aŭ ili forveturis por la somero, provizore transdoninte ilin al iu privata ĉevalejo. Al li ŝajnis, ke li rememoris ion aŭditan pri la Lindley'oj kaj iliaj ĉevaloj, sed la rememoro estis malklara. Li ekiris plu, nudpiede, tra malseka herbo, al la Welcher'oj, kie li trovis, ke ilia baseno estas malplena kaj seka.

Ĉi tiu interrompo en la ĉeno de la basenoj absurde seniluziigis lin, kaj li fartis kiel iu es-

ploristo, kiu serĉas la fonton de la torento kaj trovas nur sekan riverujon. Li estis seniluziiginta kaj intrigita. Tio estis kutima – forveturi por somero, sed neniu malplenigus sian basenon. La Welcher’oj sendube estis forveturintaj. La apudbasena meblaro estis faldita, stokita kaj kovrita per gudrita papero. La banejo estis ŝlosita. Ĉiuj fenestroj de la domo estis fermitaj, kaj proksimiĝante al la alveturejo, li vidis la signon “VENDATA”, najlitan al arbo. Kiam li lastfoje aŭdis ion pri la Welcher’oj, ĉu tiam, kiam li kaj Lucinda kun bedaŭro rifuzis ilian inviton por festeno? Ŝajnis, ke tio okazis nur antaŭ unu semajno. Ĉu la memoro estis perfidanta lin, aŭ li tiom bone dresis ĝin por opresi la malagrablajn faktojn, ke li difektis sian senson de la vero? Poste li ekaŭdis distajn sonojn de tenisludo. Tio plivigliĝis lin, forviŝis ĉiujn liajn timojn kaj igis lin trakti indiferente la malalte pendantan ĉielon kaj malvarman aeron. Tio estis la tago, kiam Neddy Merrill tranaĝis la distrikton: tio estis la tago! Kaj li komencis sian plej malfacilan piedmarŝan parton de la vojaĝo.

Se vi entreprenis dimanĉan posttagmezan vojaĝon ĉi-tage, vi verŝajne vidis lin, preskaŭ nudan, starantan ĉe la rando de Itinero 424, atendantan la ŝancon por transiro. Vi verŝajne ekinteresiĝis, ĉu li estis viktimo de rabistoj, ĉu lia aŭto paneis, aŭ ĉu li simple estis stultulo. Staranta nudpiede en la vojrandaj rubaĵoj – bieraj vazoj, ĉifonoj kaj pecoj de eksplodintaj pneŭmatikoj, – malfermita por ajna moko, li aspektis kompatinda. Startante li sciis, ke tio estos la parto de lia aventuro – ĝi estis sur lia mapo – sed renkontinte la vicojn de trafiko, vermumantajn en somereca lumo, li komprenis, ke li ne estis preta. Li estis priridata, insultata; biervazo trafis lin, kaj li havis nek dignon, nek honoron por sin subteni en la situacio. Li povus reveni al la Westerhazy’oj, kie Lucinda estus plu sidanta sub la suno. Li subskribis nenion, juris pri nenio, promesis nenion, eĉ al si mem. Kial do, kredante, ke la tuta homa persistemo subiĝos al prudento, li ne povis turni sin kaj iri reen? Kial li determinis por si mem, ke li devas iri ĝis la fino, eĉ se tio endanĝerigos lian vivon? En kiu momento ĉi tiu ŝerco, ĉi tiu arlekenajo, ĉi tiu bubajo iĝis serioza? Li ne povis reveni, li eĉ ne povis klare rememori la verdan akvon ĉe la Westerhazy’oj, la senton de inhalado de la tageroj, la amikecajn kaj senstreĉajn voĉojn, dirantajn ke ili drinkis tro multe. Dum nur unu horo li trairis la distancon, kiu faris la revenon neebla.

Iu oldulo, testudumanta laŭ la ŝoseo dek kvin mejlojn hore, permesis al li trafi la mezon de la ŝoseo, kie estis herbkovrita dividstrio. Ĉi tie li trafis la mokatakojn de la norddirekta trafiko, sed post dek aŭ dek kvin minutoj da atendo li sukcesis transiri. De ĉi tiu loko estis nur mallonga piediro al Ripozcentro rande de la vilaĝo Lancaster, kie estis kelkaj handbalaj kampoj kaj publika baseno.

La influo de la akvo al la voĉoj, la iluzio de brilado kaj subteno estis la samaj ĉi tie, kiaj ili estis ĉe la Bunker’oj, sed la sonoj ĉi tie estis pli laŭtaj, pli akraj, kaj pli penetrantaj; kaj enirinte la ĉirkaŭbaritan placeton, plenan de homoj, li renkontis la reĝimajon. “ĈIU NAĜANTOJ DEVAS DUŜI SIN ANTAŬ UZI LA BASENON. ĈIU NAĜANTOJ DEVAS PASI LA PIEDLAVUJON. ĈIU NAĜANTOJ DEVAS HAVI IDENTIGAJN DISKOJN.” Li duŝis sin, lavis siajn piedojn en ŝlima amara diluaĵo, ekiris inter la homoj al la eĝo de la baseno. Ĝi fetoris klore kaj aspektis kiel lavkuvo. Paro da savistoj blavis policajn fajfilojn kun kvazaŭ regulaj intervaloj kaj ĉikanis la naĝantojn per publika anonca sistemo. Neddy rememoris la allogan sapfiran akvon ĉe la Bunker’oj, kaj ekpensis, ke li povus kontaĝi sin – difekti siajn proprajn prosperon kaj ĉarmon – se li naĝus en ĉi tiu ŝlimo, sed li rememorigis al si mem, ke li estas esploristo, pilgrimanto, kaj la baseno estis nur stagnanta lageto ĉe la rivero Lucinda. Li plonĝis en la klorajon, faltiĝante pro abomeno, kaj devis naĝi tenante la kapon super la akvo, por eviti koliziojn, sed eĉ tiel li kunpuŝiĝis, plaudiis kaj frapiĝis. Kiam li atingis la malprofundan parton de la baseno, ambaŭ savistoj ekkriis al li: “Hej, vi, sen iden’ disko, for el la akvo!” Li elakviĝis, sed ili ne intencis ĉasi lin,

kaj li ekiris tra fetoro de sunoleo kaj kloro, eliris trans dratan barieron kaj preterpasis la handbalan kampeton. Transirinte la vojon, li eniris la arbaran parton de la Halloran'a tereno. La arbaro ne estis purigita, kaj la grundo estis perfidema kaj malplezura por paŝi la tutan vojon ĝis la herbejo kaj faga tondita heĝo, kiu ĉirkaŭis la basenon.

La Halloran'oj estis amikoj, maljunaj geedzoj, enorme riĉaj, kiuj ŝajne ĝuegis la suspekton, ke ili estas komunistoj. Ili estis fanatikaj reformistoj, sed ili ne estis komunistoj, kaj eĉ kiam ili estis akuzataj, kiel sporade okazis, ke ili estas renversistoj, tio ŝajne nur ĝojigis kaj ekscitis ilin. Ilia faga heĝo estis flava, kaj li ekpensis, ke ankaŭ ĝi estas infektita, samkiel la acero ĉe la Levy'oj. Li ekkriis: "Hej, hej!" por averti la Halloran'ojn pri sia proksimiĝo, por plimildigi la atencon kontraŭ ilia privateco. La Halloran'oj, pro iuj kialoj, kiujn ili neniam klarigis al Ned, neniam surhavis bankostumojn. Kaj vere, neniuj klarigoj estus taŭgaj. Ilia nudeco estis ero de ilia senkompromisa fanatikismo pri reformoj, kaj li afable elpaŝis el sia naĝpantalono antaŭ trairi la interrompon de la heĝo.

S-ino Halloran, dika, grizhara virino kiun serena vizaĝo estis leganta "The Times". S-ro Halloran estis kolektanta la fagajn foliojn el la akvo per malgranda ŝovelilo. Por ili ŝajne ne estis surprize aŭ malplezure vidi lin. Ilia baseno, konstruita el adzitaĵ brikformaj ŝtonoj kaj nutrata per la roĵo, estis verŝajne la plej antikva en la distrikto. Ĝi havis nek pumpilon, nek filtrilon, kaj ĝia akvo similis al malhela oro de la torento.

"Mi estas naĝanta tra la distrikto," – diris Ned.

"Ho, mi neniam pensis, ke iu povus," – eksklamis s-ino Halloran.

"Jen, mi komencis ĉe la Westerhazy'oj," – diris Ned. – "Tio estas proksimume kvar mejloj."

Li metis la naĝpantaloneton ĉe la profunda flanko, iris al la malprofunda kaj tranaĝis la fragmenton. Eltrenante sin el la akvo li aŭdis s-inon Halloran diri: "Por ni estas *terure* domaĝe aŭdi pri ĉiuj viaj malsukcesoj, Neddy."

"Miaj malsukcesoj?" – demandis Ned. – "Mi ne scias, pri kio temas."

"Nu, ni aŭdis ke vi vendis vian domon, kaj viaj kompatindaj infanoj..."

"Mi ne memoras, ke mi vendis la domon," – diris Ned, – "kaj la knabinoj estas hejme."

"Jes," – s-ino Halloran suspiris. – "Jes..." – Ŝia voĉo plenigis la aeron per neĝustatempa melankolio, kaj Ned diris abrupte: "Dankon pro la baseno."

Transirinte la heĝon li surmetis la naĝpantaloneton kaj streĉis ĝin. Ĝi iĝis tro granda, kaj li pensis, ĉu li estis maldikiĝinta en la tempospaco de ĉi tiu tago. Li frostis, li laciĝis, kaj la nudaj Halloran'oj deprimis lin. La naĝado estis jam troa por liaj fortoj, sed ĉu li povis tion antaŭvidi glitante laŭ la balustrado ĉi-matene kaj sidante sub la suno de la Westerhazy'oj? Liaj brakoj lamis, liaj kruroj estis kvazaŭ kaŭĉukaj kaj doloris ĉe la artikoj. La malplezurojn kronis la malvarmo en liaj ostoj kaj la sento, ke li neniam plu varmiĝos. Folioj faladis ĉirkaŭ li kaj li flaris fumon en la vento. Kiu bruligas lignaĵojn en ĉi sezono?

Li bezonegis drinkon. Viskio plivarmigus lin, levus lin, portus lin tra la resto de lia vojaĝo, refreŝigus lian senton ke tio estas originala kaj valoras – naĝi tra la distrikto. Naĝantoj trans la Kanalon kunprenas brandon. Li bezonis stimuilon. Li transiris la herbejon antaŭ la domo de la Halloran'oj kaj ekiris malsupren laŭ eta pado al la loko, kie ili konstruis domon por ilia sola filino, Helen, kaj ŝia edzo, Eric Sachs. La baseno de la Sachs'oj estis malgranda, kaj li trovis Helen'on kaj ŝian edzon apud ĝi.

"Ho, Neddy," – diris Helen, – "Ĉu vi lunĉis ĉe la panjo?"

"Vere, ne," – diris Neddy. – "Mi *haltis* por vidi viajn gepatrojn." – La klarigo ŝajnis esti sufiĉa. – "Mi petas grandan pardonon, ke tiamaniere enrompiĝas al vi, sed mi malvarmumis, kaj kuraĝas peti de vi drinkon."

"Ho, mi kun plezuro donus," – diris Helen, – "sed en ĉi domo estas neniuj alkoholaĵoj de post la operacio de Eric. Tio okazis antaŭ tri jaroj."

Ĉu li estis perdanta sian memoron, ĉu lia talento pri kaŝado de turmentaj faktoj helpis lin forgesi, ke li vendis sian domon, ke liaj infanoj estis en danĝero, kaj lia amiko estis malsana? Liaj okuloj saltis de la vizaĝo de Eric al lia abdomeno, kie li vidis tri palajn, suturitajn cikatrojn, du el ili estis almenaŭ futon longaj. Lia umbiliko malaperis, kaj kion, pensis Neddy, faros la vaga mano, kontrolanta la apudan liton je la tria horo matene, faros al la ventro sen umbiliko, sen ligo al nasko, ĉi tiu breĉo en la heredo?

“Mi estas certa, ke vi trovos drinkon ĉe la Biswanger’oj,” – diris Helen. – “Ili havas enorman festenon. Vi povas aŭdi tion de ĉi tie. Aŭskultu!”

Ŝi levis la kapon, kaj el trans la vojo, la herbejoj, ĝardenoj, arbaroj, kampoj, li denove ekaŭdis la diamantan sonon de voĉoj super akvo. “Nu, mi malsekiĝos,” – li diris, plu sentante, ke li ne havas liberon elektante sian transportmanieron. Li plonĝis en la basenon de la Sachs’oj, kaj anhelante, proksime al drono, kovris la distancon inter la basenaj eĝoj. “Lucinda kaj mi *terure* volus vidi vin,” – li diris trans la ŝultron, lia vizaĝo estis turnita al la Biswanger’oj. “Ni ege bedaŭras, ke ni ne renkontiĝis tiom longe, kaj ni telefonos *tre* baldaŭ.”

Li transiris kelkajn kampojn, direktante sin al la Biswanger’oj kaj la sonoj de festeno tie. Tio estos honoro por ili – doni al li drinkon, tio estos plezuro por ili – doni al li drinkon. La Biswanger’oj invitadis lin kun Lucinda kvar fojojn jare, ses semajnojn anticipe. Ili ĉiam estis rifuzataj, sed ili plue sendadis la invitilojn, ne volante kompreni la rigidajn kaj maldemokratecajn realaĵojn de la socio. Ili estis la speco de homoj, kiuj pridiskutas la prezojn dum koktelumoj, merkatan situacion dum lunĉo, kaj post lunĉo rakontas maldecaĵojn al miksitaj kompanio. Ili ne apartenis al la konatoj de Neddy – ili eĉ ne estis en Kristnaska kartlisto de Lucinda. Li iris al ilia baseno kun la sentoj de indifereco, bonfaro kaj iu sinĝeno, ĉar ŝajne jam krepuskiĝis, kaj tio estis la plej longaj tagoj de la jaro. La festeno, kiam li aliĝis, estis bruema kaj granda. Grace Biswanger estis la speco de mastrino, kiu invitadis optikmezuriston, veterinaron, hipotekan agenton kaj dentiston. Neniu estis naĝanta, kaj la krepusko, reflektata en la basena akvo, havis vintrecan aspekton. Tie estis stardrinkejo, kaj li direktis sin al ĝi. Kiam Grace Biswanger ekvidis lin, ŝi venis al li ne kun plezuro, por kio li havis sufiĉe da rajtoj, sed kvereleme.

“Jen, la festeno havas ĉion,” – laŭte diris ŝi, – “inkluzive de pordrompanto.”

Ŝi ne povis doloriĝi lin sociale – pri tio eĉ ne temis, kaj li ne ŝirmiĝis. “Kiel la pordrompanto,” – ĝentile demandis li – “ĉu mi taŭgas por havi drinkon?”

“Memstare,” – respondis ŝi. – “Vi, ŝajne, ne tro atentas la invitojn.”

Ŝi turnis sin dorse al li kaj aliĝis al grupeto da gastoj, kaj li direktis sin al la stardrinkejo kaj petis viskion. La kelnero priservis lin, sed priservis lin krude. Lia mondo estis la mondo, kie la servistaro difinis la socian nivelon, kaj la fakto, ke li estis forpuŝita de provizora kelnero, signifis, ke li perdis iom da socia digneco. Aŭ eble la homo estis nova kaj ne informita. Poste li aŭdis, kiel Grace parolas malantaŭ lia dorso: “Ili ruiniĝis dum unu nokto – nenion krom enspezo – kaj en iu dimanĉo li venis ebria, kaj petis nin pruntedoni al li kvin mil dolarojn...” Ŝi ĉiam parolis pri mono. Tio estis eĉ malpli bona ol manĝi pizojn per tranĉilo. Li plonĝis en la basenon, tranaĝis ĝin laŭlonge kaj foriris.

La sekva baseno en lia listo, la tria de la fino, apartenis al lia delonga koramikino, Shirley Adams. Se li suferis ĉe la Biswanger’oj, li povis kuraciĝi ĉi tie. Amo – fakte, seksuma frenezo – estis la perfekta eliksiro, dolor-detruilo, helkolorigita pilolo, kiu ree enmetos risortojn en liajn paŝojn, kaj la ĝojon – en lian koron. La lasta rendezuo estis pasintsemajne, pasintmonate, pasintjare. Li ne povis rememori. Estis li, kiu iniciatis la disigon, liaj sentoj la avantaĝoj, kaj li paŝis trans la pordon en la muro, kiu ĉirkaŭis la basenon, kun neniua sento krom memkonfido. La baseno estis iusence lia propraĵo, samkiel la amanto, precipe kaŝamanto, ĝuas la posedon de sia kunulino kun la ardo, nekonata por

sanktigita edziĝo. Ŝi estis tie, ŝia hararo havis la kupran koloron, sed ŝia staturo, ĉe la eĝo de iluminita, lazura akvo, vekis en li neniujn profundajn rememorojn. Tio estis, pensis li, nur facilhora amindumo, kvankam ŝi ploris kiam li disŝiris la rilatojn. Ŝi aspekte estis konfuzita vidi lin, kaj li interesiĝis, ĉu ŝi plu estas korvundita. Ĉu ŝi, savu min Dio, denove ekploros?

“Kion vi volas?” – demandis ŝi.

“Mi naĝas tra la distrikto.”

“Sankta Kristo. Kiam vi maturiĝos?”

“Pri kio temas?”

“Se vi venis por peti monon...” – diris ŝi.

“Ĉu vi povus doni al mi drinkon?”

“Mi povus, sed mi ne donos. Mi ne estas sola.”

“Mi simple vojaĝas.”

“Mi ne donos al vi eĉ unu cendon.”

Li plonĝis kaj tranaĝis la basenon, sed kiam li provis elteni sin sur la randon, li trovis, ke la forto foriris el liaj brakoj kaj ŝultroj, kaj li alnaĝis la eskalon kaj elgrimpis. Rigardinte trans la ŝultron li vidis en iluminita banejo junulon. Elirante al malhela herbejo li flaris krizantemojn aŭ asterojn – iun obstinan aŭtunan aromon, fortan, kiel gaso. Rigardinte supren li ekvidis, ke la steloj jam aperis, sed kial li vidis Andromedon, Cefeon kaj Kasiopeon? Kio okazis al la konstelacioj de mezsomero? Li ekploris.

Li ploris, verŝajne, en la plej unua fojo dum lia matura vivo, la unuan fojon en sia vivo li sentis sin tiom malfeliĉa, malvarmiĝinta, laca kaj konsternita. Li ne povis kompreni la krudan konduton de la kelnero aŭ malĝentilecon de la amatino, kiu antaŭe estis venanta al li surgenuje kaj priŝutis lian pantalonon per larmoj. Li estis naĝanta tro longe, li estis subakve tro longe, kaj lia nazo kaj lia gorĝo doloris pro la akvo. Ĉio, kion li bezonis, estis drinko, iu kompanio, kaj iuj puraj, sekaj vestaĵoj, sed kvankam li povus mallongigi la vojon, irante laŭ la strato, li direktis sin al la baseno de la Gilmartin’oj. Tie, la unuan fojon en la vivo, li ne plonĝis, sed subeniris laŭ ŝtuparo en glacian akvon kaj eknagiis per iu lama, senritma stilo, kiun li povus uzi en la juneco, nur lernante naĝi. Li ŝanceliĝis pro senfina laciĝo, irante al la Clyde’oj, kaj padelumis ilian basenon laŭlonge, haltante denove kaj denove por ripozi kun la mano sur la basena eĝo. Li surgrimpis la eskalon kaj pensis, ĉu li havis la forton por iri hejmen. Li faris tion, kion li volis, li tranaĝis la distrikton, sed li estis tiom stuporita pro inanicio, ke lia triumfo aspektis iluzia. Ĝibetiĝinte, apogante sin je la pordfostoj, li eniris la alveturejon de sia domo.

La domo estis malhela. Ĉu estis jam tiom malfrue, ke ĉiuj estis enlitiĝintaj? Ĉu Lucinda restis ĉe la Westerhazy’oj por vespermanĝi? Ĉu la knabinoj aliĝis al ŝi, aŭ foriris ien? Ĉu ili ne decidis, samkiel ili ĉiam faris dimanĉe, rifuzi ĉiujn invitojn kaj resti hejme? Li ektiris la garaĝan pordegon por vidi, ĉu la aŭtoj estis ene, sed la pordego estis ŝlosita, kaj rusta anso makulis lian manon. Irante al la domo li rimarkis, ke la furiozo de la ŝtormo forŝiris unu el pluvkanelojn de la tegmento. Ĝi pendis antaŭ la fronta pordo, kiel ombrela spoko, sed li povus ripari tion matene. La domo estis ŝlosita, kaj li pensis, ĉu la stulta kuiristo aŭ stulta servistino ŝlosis la pordon, sed poste li rememoris, ke longa tempo pasis de post la momento, kiam ili dungis kuiriston aŭ servistinon. Li ekkriis, frapis la pordon per la pugno, provis puŝi ĝin per la ŝultro, kaj poste, rigardante al la fenestroj, komprenis, ke la domo estis vaka.

*el la angla tradukis Aleksej Guljajev (Taganrog)*

# ENIGMOJ.

## ANAGRAMOJ

Anagramo estas miksaĵo de literoj. Vi vidas iujn litervicojn kaj devas reordigi ilin tiel, ke el sensenca aro formiĝu normala vorto en ajna formo. Ekzemple: SESADOP = POSEDAS.

IREMANOIS  
EDONIST  
KESURKOS  
ERZODI  
PIKOMANA  
TANIFARI  
SELKRIO

## MALŜARADOJ

Oni prenas normalan (ne kunmetitan) Esperantan vorton kaj dispecigas ĝin je kelkaj signifaj partoj, kiel en kutima ŝarado. Sed poste ĉiun vorteron oni anstataŭigas per ĝia antonimo. En Eo, certe, oni ne povas skribi senpere mal-vortojn, do anstataŭigo estas iom arbitra, por sprituloj. Por plifaciligi la taskon estas aldonita normala priskribo de la celita vorto. Ekz., SUKERO (= SUK-ERO) - BRAND-ARO, aŭ blanka morto.

IS-AKVO, aŭ aŭtuna floro  
HAJLA LAGO, aŭ mara mamulo  
VIRA EKLEZIO, aŭ sespiedulo  
MONTA KUPRO, aŭ admirindaĵo  
VORTA KAVO, aŭ verkaro

## KOMPRENU LA IDEON

Vi vidas vicojn da literoj. Pensu, laŭ kiu regulo ili estas aranĝitaj, kaj ekskludu en ĉiu vico superfluan literon.

1. J, F, M, A, M, J, P, J, A, S, O, N, D
2. U, D, T, K, V, K, S, S, O, N, D
3. O, B, R, K, E, S, T, R
4. N, G, D, C, A
5. R, M, O, F, V, B, V

### *La respondoj al la taskoj en REGO № 2(9):*

1. Tagoj de Semajno: Lundo,  
Mardo ktp.
2. KOM-PLOTO, GAZ-ONO,  
TUR-KISO, PARO-DIO,  
FAGO-PIRO.
3. TAR, KAT, MUS, STUD,  
BAL, TUR.
4. IDEALO, ARDEO,  
OKSIKOKO, HELIANTO,  
LEONO.

*La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>) aŭ poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71).*

---

---

## UTILAJ ADRESOJ

**REU:** p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>;  
ttt-ejo <http://www.reu.newmail.ru>.

**Libroservo de REU:** p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@vens.ru>;  
plena katalogo <http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>.

**REJM:** str.Dugina 17 – 62, 140180 Ĵukovskij, Moskva reg. ;  
retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

**UEA:** Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando;  
retadreso <uea@inter.nl.net>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

Mi longe portas sur la ŝultroj  
Malĝojan ŝarĝon... Premas min  
Nerepagitaj iam ŝuldoj  
Al miaj patro kaj patrin’.

Kaj temas ne pri mon’ kontanta,  
Sed pri malfrua mia pent’:  
Al ili restis mi ŝuldanta  
Kareson, iom da atent’,  
Ektuŝon mildan kaj manpremon,  
Parolon varman kun ridet’  
Kaj komprenemon, komprenemon  
Al ĉiu vorto, ĉiu pet’...

Kaj, kiel vundo sub cikatro,  
Doloras ĉiutage min  
La granda ŝuldo al la patro,  
La granda ŝuld’ al la patrin’.

11.93

**Mikaelo Giŝpling** (*el la libro “El sisma zono”*)

**REGo** (Rusia Esperanto-Gazeto) № 4 (11) aŭgusto 2002

*komuna eldono de REU kaj REJM*

*redaktas* Garik Kokolija *retadreso* <gazeto@mail.ru>

*poŝta adreso* Pjatinckoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio

*por tiu ĉi numero kunlaboris* Viktor Aroloviĉ, Grigorij Arosev

*la gazeto estas produktita en la presejo* “Policvet” (Klin)

**abontarifoj por 2002:**

*por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KŜŜ – 100 rubloj sendendaj al:*

Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва

*por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto* **kklg-r** *ĉe* UEA